

Roland Platteau (komp.)

**En la lumoj de ekmiroj
Travagado inter poeziaĵoj
de la mondo**

Roland Platteau (komp.)

En la lumoj de ekmiroj

**Travagado inter poeziaĵoj
de la mondo**

**Elektitaj kaj tradukitaj
de Roland Platteau**

Monda Asembleo Socia (MAS)

Roland Platteau (komp.)

En la lumoj de ekmiroj
Travagado inter poeziaĵoj de la mondo

Elektitaj kaj tradukitaj de Roland Platteau
kontrollegitaj de Josip Pleadin kaj Serge Sire

Embres-et-Castelmaure
Monda Asembleo Socia (MAS)
2019
ISBN 78-2-36960-197-5

(= MAS-libro n-ro 231)



« *Odor' de fruktoj mortaj en la muskoj, Oktobro* »
(G.E. Maŭra – en *Unuversaj Universoj*)

Enhavtabelo

Antaŭrimarko.....	12
Kelkaj pliaj klarigoj.....	13
AUGUSTE ANGELLIER.....	14
GUILLAUME APOLLINAIRE.....	15
Annie.....	15
Kanto de l' misamato.....	16
La sep spadoj.....	18
La Kato.....	19
Majo.....	19
La korkolombo kaj ŝprucfontano.....	21
LOUIS ARAGON.....	22
Divenu.....	22
W. H. AUDEN.....	24
Funebra Ve.....	24
JULOS BEAUCARNE.....	25
La okuloj.....	25
CHARLES BEAUDELAIRE.....	27
Leviĝo.....	27
JOACHIM DU BELLAY.....	28
« Bedaŭroj » - soneto 13.....	28
LUC BERIMONT.....	29
Tranĉilakrigisto.....	29
ROBERT BURNS.....	30
Al muso.....	30
BLAISE CENDRARS.....	32
"sekretaj neeldoniĵoj".....	32
Prozo de l'transsiberia vagonaro.....	33
FRANCIS COMBES.....	35
Ĉu oni povas kalkuli je la popolo ?.....	35
CHARLES CROS.....	36
Estonteco.....	36
MARCELINE DESBORDES-VALMORE.....	37
Saadiaj rozoj.....	37
ROBERT DESNOS.....	38
Kanzono de somera trotuaro.....	38
EMILE DESPAX.....	39
Ultima.....	39
EDASSERI GOVINDAN NAIR.....	40
Kiel Diserva Floro.....	40

JOSEPH von EICHENDORFF	41
Lunnokto.....	41
PAUL ELUARD.....	42
Mia mortintino.....	42
FAĪZ AHMED FAĪZ.....	43
Soleco.....	43
LÉON-PAUL FARGUE.....	44
Nenia vok' povos niajn vizaĝojn veki.....	44
ANDRÉ FRÉNAUD.....	45
Vivanta memoro de Jozefo F. fiŝisto en Koljur'.....	45
KONSTANTY ILDEFONS GAŁCZYŃSKI.....	46
Balado pri stratoj de Krakovo.....	46
WOLFGANG GOETHE.....	47
PAUL GRAVOLLET.....	48
NATHALIE HETRU.....	49
La sep sunoj verdaj.....	49
VICTOR HUGO.....	50
FRANCIS JAMMES.....	51
Ĝis morgaŭ sumos jar'.....	51
Kompatinda bovo, kiu aŭskultadis grilojn.....	52
KONSTANTINOS KAVAFIS.....	53
Ambasadoroj el Aleksandrio.....	53
Reĝo Demetrio.....	54
Depost la naŭa vespere.....	55
La Trojanoj.....	56
La urbo.....	57
PATRICE DE LA TOUR DU PIN.....	58
Loĝatejoj.....	58
VALÉRY-LARBAUD.....	59
Skeveningo mortsezono.....	59
LI JU.....	60
FRANÇOIS DE MALHERBE.....	61
OSCAR MIŁOSZ.....	62
Kaleŝo staranta ĉe nokto.....	62
CHRISTIAN MORGENSTERN.....	64
Estetika putoro.....	64
La preĝo.....	64
WILHELM MÜLLER.....	65
La Tilio.....	65
ALFRED DE MUSSET.....	66

TASLIMA NASRIN.....	67
La nesonorinta sonoro.....	67
KAZI NAZRUL ISLAM.....	68
Katenitaj.....	68
Kontraŭ rigard' mia ne plu ridas rozoj.....	69
Ŝtelistoj kaj rabistoj.....	70
MARIA NICOLINI.....	72
Fokusigo.....	72
GEO NORGE.....	73
Krimo kaj puno.....	73
Atendo.....	73
Malamikoj.....	74
FALO DE DIINO.....	75
Sako Maliceta.....	76
MANUEL DE NOVAS.....	77
Rajto naskiĝi.....	77
NGUYỄN TRÃI.....	78
Al amiko.....	78
PAO CAO.....	79
„Vojaĝosuferoj“.....	79
CATHERINE PAYSAN.....	80
Kial ŝatas mi nebulon.....	80
JEAN PEROL.....	81
Demandoturmentejo.....	81
SAINT-JOHN PERSE.....	82
POEMO PO SEKVO.....	85
Ni enterigis vorton de l' vortaro.....	85
FILIPPE PINTO.....	87
« Patrin' mia 'stis cigaredist' ».....	87
EZRA POUND.....	88
La subtegmento.....	88
GIL PRESSNITZER.....	89
Omaĝo al Luc Bérimont.....	89
JACQUES PRÉVERT.....	90
Al l'azeno.....	90
Bestoj.....	91
La mesaĝo.....	93
Je hazardoj de la birdoj.....	94
La pacparolado.....	95
SULLY PRUDHOMME.....	96

RAYMOND QUENEAU.....	97
La Nokto.....	97
REMY REY.....	98
Malpermesita.....	98
JOACHIM RINGELNATZ.....	101
Am' plej mallonga.....	101
Du formikoj.....	102
Nu tio al ni okazis.....	103
La poŝtmarko.....	104
Poemo en zi-lingvo.....	105
Straßenbahn 23 kaj 13.....	106
RANDA SABRY.....	107
El taglibro de juna Irakanino.....	107
DOMINIQUE SAMPIERO.....	108
Rezigninte je ĉio krom ĉeesto.....	108
CARL SANDBURG.....	109
Perla nebulo.....	109
SENNOMA 1.....	110
SENNOMA 2.....	111
SENNOMA 3.....	112
SHEL SILVERSTEIN.....	113
La knabeto kaj la maljunulo.....	113
JULES SUPERVIELLE.....	114
Alvoko al nokto.....	114
Atendo morton.....	115
Inrevenfantomo.....	116
Vi afablu al poeto!.....	117
WISŁAWA SZYMBORSKA.....	118
Laŭdo al malbona konscienco.....	118
ŜAHRZAD IRANI.....	119
Kio estas amo per alia nomo.....	119
RABINDRANATH TAGORE.....	122
« Poema oferdone » - poemo n° 60.....	122
« Poema oferdone » - poemo n° 74.....	123
Kanto de l'malvenko.....	124
Nokto.....	125
JEAN TARDIEU.....	126
La deca mond-civitano.....	126
<i>Ni hipotezu la problemon solvita aŭ</i> La filozofia ruzaĵo.....	128
Pronomstudaĵo.....	129

Solipsismo.....	130
ERIC TELLENNE.....	131
Recitaĵo.....	131
PAUL-JEAN TOULET.....	132
En Arles kie 'stas Aliskampoj.....	132
BERNARD DE VENTADOUR.....	133
"vidanta mi l'alaŭdon svingi ..."	133
EMILE VERHAEREN.....	134
Vento novembra.....	134
Koroj kompatindaj.....	135
Arboj sanktuloj mortintoj ventoj.....	136
PAUL VERLAINE.....	138
Maldiligentaj.....	138
Obtuze.....	139
ALFRED DE VIGNY	140
WALT WHITMAN	141
Kiam mi aŭdis la kleran astronomiiston.....	141
Senbruan Paciencon Araneon.....	142
CHANDRA WICKRAMASINGHE.....	143
JEAN ZAY.....	144
La Flago.....	144
La Monda Asembleo Socia (MAS) kaj ĝiaj libroj.....	146

Antaŭrimarko

Vi trovos jen poemojn tre diversajn, de tre diversaj poetoj kaj landoj.

Ili estas ĉefe de francaj poetoj, ĉar ili estas tekstoj, kiujn mi povis malkovri en la franca originalo aŭ danke al franca aŭ angla traduko ; tiuj, kiujn mi malkovris danke al Esperanta traduko ne estas tie, ĉar ili ne plu bezonas esti tradukitaj !

Fakte tiu ĉi libro estas nur vagado de limako inter perloj el la homaj koroj. Perloj, kiujn mi pensas esti plej raraj.

Ne plendu se tiu libro estas malsolida, ĝi estas « katido de monato aŭgusto »¹.

Mia nura espero estas, ke ĉe kelkaj ĝi iĝos libro kun eluzitaj kaj ĉeangule falditaj paĝoj.

Ste-Catherine, la 15-an de septembro 2016

Roland Platteau

¹ Franca esprimo, kiu rilatas al la kutimo de katoj en la norda hemisfero, por eviti la krudan vintron al la novnaskitoj, naski normale en Majo.

Kelkaj pliaj klarigoj

La poemoj estas ordigitaj alfabete laŭ la familia nomo de la aŭtoroj ne esperantigita sed laŭ la formo sub kiu ili aperas en Vikipedio. Mi unuavice intencis vicigi la poemojn laŭ ia „poezia” signifa ordo, sed tio estus granda kaj ĉiam diskutinda zorgo. Do mi elektis tute neŭtralan prezenton alfabetvican (kaj por la sennomaj kronologian), en kiu ĉiu leganto povos mem krei sian propran labirinton kaj emfazojn.

Poezion oni ne tradukas per la cerbo (nek kun la vortaroj, eĉ se ili utilas) sed per la koro kaj ĉefe la orelo. Intuicie. La celo estas rekrei la saman efekton, kiun oni sentis legante en la devena lingvo. La formo? Ĝi ne prezentas valoron en si mem, sed estas rimedo. Gravas kion ĝi rezultigas: la etoso, „muziko”, efekto. Ĝi efikas favore al respekto de l' enhavo kaj efiko de l' etoso. Do mi opinias, ke oni povas rezigni je ia 100-elcenta redono de l' formo, eĉ se estas pli bone kiam tio eblas.

La poemoj estas esperantigitaj el la originlingva versio, krom kiam tio estas indikita.

Principe mi malŝatas neologismojn kaj samopinias pri tio kun Claude Piron, sed mi tamen unu/du fojojn uzis kelkajn.

Roland Platteau

AUGUSTE ANGELLIER

La nokto de senfinaj nenioj

Tiel ni restados dise en la vivo,
Kaj koroj kaj korpoj niaj vane vokos
Neniam kunintaj en dia momento,
Kiam kontentiĝas la homa pasio.

Poste kiam venos tiu lasta dormo,
Ili enfosos vin for de mia tombej',
Ni 'stos ekzilitoj en la profunda ter'
Post estinti tiaj sub la brila suno ;

Malsamaj marmoroj elmontros gravure
Nomojn niajn, malfeliĉajn, ĉiam disajn,
Kaj la granda amo, kiu ardas en ni,

Sen flamigi ajnan vivontan animon
Lasintaj el si malpli ol faras nestoj
Falos en nokton de senfinaj nenioj.

GUILLAUME APOLLINAIRE

(Apollinaire neniam uzas interpunkciojn)

Annie

Sur marbordo de Teksaso
Inter Mobile kaj Galveston kuŝas
Granda ĝarden' rozojplena
Ankaŭ domon ĝi enhavas
Kiu estas kvazaŭ granda rozo

Ofte virino promenas
En la ĝardeno tutsola
Kaj kiam sur la randita per tilioj ŝoseo mi pasas
Ni rigardas nin

Ĉar tiu virino estas menonito,
ŝiaj vestoj ne havas butonojn
Kiel ŝiaj rozuoj ne florburĝonojn
Sur mia jako du mankas
Do la sinjorino kaj mi preskaŭ la saman riton sekvas

Kanto de l' misamato

Elĉerpajoj

Plej fama poemo de la aŭtoro, longa vagado teme, entenas apartajn pecojn, eblas legi ĝin fragmente

Pajno : granda dio de la greka mitaro, kiu laŭ rakonto de Plutarĥo, mortis. La temo estis reprenita de Niĉeo kiel simbolo de la morto de la religiaj esperoj.

Maŭzolo: reĝo de la greka antikveco, por kiu ties vidvino, nekonsolebla, konstruigis egan tombon, kiu estis konsiderata kiel unu el la mirindaĵoj de la mondo.

Vulkan'o: romia dio, forĝisto, la roma versio de la greka Hefesto. danaĵoj : personoj de la greka mitaro, kiuj estis kondamnitaj en la postmorto verŝi akvon en vazon, kiu neniam pleniĝas.

Dekalogo : La Dekalogo, aŭ Dek Ordonoj, de Moseo estas la baza moralo de judismo kaj kristanismo.

...

Bela ŝip' mia memoro
Ĉu ne sufiĉe naĝis ni
Sur malbongusta ondaro
Ĉu ne vagis sufiĉe ni
De l' mateno ĝis vespero

...

Multaj dioj tiaj pereis
Tion priploras salikoj
Granda di' Pajno Kristo am'
Ja mortintas kaj kat' blekas
En korto mi ploras en Pariz'

...

Amo mortis mi tuttremas
Idolojn belajn adoras
Ĝin-similajn rememorojn
Kiel de Maŭzol' la edzin'
Mi restas kun fidel' kaj dolor'

Mi fidelas kiel dogo
Al mastro hedero al trunk'
Kaj zaporogaj kozakoj
Piaj ŝtelistaj drinkuloj
Al la Dekalogo kaj step'

...

Rigardmovoj de ŝi ŝutis
Stelojn en vesperoj tremaj
En l'okul' naĝis sirenoj
Niaj mordaj kisoj sangaj
Plorigis gard-feinojn niajn

Sed vere mi atendas ŝin
Per la koro per la anim'
Kaj sur ponto Revenumu
Se revenos tiu virin'
Nu mi diros mi kontentas

Malpleniĝas l' koro l' kapo
Elverŝiĝas tute l' ĉiel'
Per ĉi danaidaj bareloj
Ho kion fari por feliĉi
Kiel infanet' naiva

...

Vi kiu sekvas min rampe
Di' de miaj dioj mortintaj
Vi mezuras la terspacon
Al mi rajta ho mia ombr'
Ho mia malnova serpent'

Mi sub suno tion vi ŝatas
Vin kondukis ja memoru

Amata edzin' malluma
Vi 'stas mia kaj nenia
Ho min-funebranta ombro

...

La sep spadoj

I' unua 'stas tutarĝenta
Palina ĝia trema nomo
I' klingo vintra neĝa ĉiel'
Gibelina I' sanga destin'
Vulkan' ĝindumforĝe mortis

....

Estas la kvara Maluren'
Bela river' or- kaj verda
Vesperen de I' bordulinoj
Baniĝas I' korpoj amataj
Kaj remistoj trene kantas

....

La sesa el metal' de glor'
De la amik' varmaj manoj
Nin disigas ĉiu aŭror'
Adiaŭ tie vi lasas
Kokoj sonoradis en ĥor'

Kaj la sepa elĉerpiĝas
Virin' rozo unu mortint'
Dankon lastul' se bonvolas
Sur mia am' I'pardon fermu
Mi neniam ekkonis vin

....

Kondukas demonoj de sort'
Nin laŭ kanto de stelaroj
Frenez-sone violonoj
Dancigas nin homan genton
Retropaŝe en malsupron

....

La Kato

*Bezonas en mia domo mi
Translibrojpasantan katon
Virinon nefrenezumantan
Amikojn ĉiasezonajn
Sen kiuj ne povas vivi mi*

Majo

Majo rida majo sur Rejn' en boato
Belaj sinjorinoj rigardis de monto
Tiome belas vi boato glitas for
Kial je l'salikoj venis tioma plor'

Senmoviĝis foren fruktarboj florantaj
Petaloj falintaj de la arboj majaj
De ŝi kiun amis mi jen estas ungoj
Petaloj velkintaj de ŝi la palpebroj

Lante sur bord' sur voj' paŝis laŭlonge river'
Urso hundo simi' en ciganirantar'
Azenotiritan ruldomon sekvantaj
Dum flue foriris en vitkampoj Rejnaj
Surfifre ludataj arioj armeaj

Majo rida majo ornamis ruinojn

Per heder' per rozuj' per floroj abunde
Agitas vimenojn Rejna vent' surborde
Parolemajn junkojn kaj vitflorojn nudajn

La korkolombo kaj ŝprucfontano

La korkolombo kaj ŝprucfontano

(kaligramo)

(verkita dum la Unua Mondmilito)

(normale le poemo estas kaligramo, t. e. prezentigas kies desegno, bildiganta vaskon kaj ŝprucfontanon, sed mi ne povis orienti la tekston de la du kolumnoj centraj, kiuj desegnas la akvoŝprucaĵon !
Brak' = Braque fama pentristo kubisma Maks Jakob = Max Jacob fama poeto superrealisma, ili kaj ĉiuj aliaj estis amikoj de Apollinaire.
korkolombo (france : « colombe poignardée » tio estas ponardita kolombo) :

https://eo.wikipedia.org/wiki/Luzona_korkolombo

mildaj inoj ponarditaj karaj lipoj floraj
MIA MAREJ'
IJET' LORI'
ANI' kaj ci MARI'
kie 'tas
vi ho
junulin'
SED
apud
ŝprucfontanoj
kiuj preĝe ploras
tiu kolombo ekstaziĝas

?

La memoroj el temp' foraj	Kien Reĵnal' Daliz' Billi'
Ho amikoj enmilitaj	Viaj nomoj melankoli'
Al ĉielo ŝprucadantaj	Kiel en kirk' paŝaj sonoj
Rigardoj viaj en la akvo	Kie 'stas Kremnic' volontulo
Melankolie mortadas	Eble jam mortintaj estas
Kie 'stas Brak' kaj Maks' Jakob	Per memoroj la kap' plenas
Derain kun l'okuloj grizaj	L'ŝprucfontano por mi ploras

EN NORDO TIUJ KIUJ MILITIRIS NUN ESTAS BATALANTAJ

Falas vesper' hO sanga maro !

Ĝardenoj kie sangadas oleandro militeca floro

esperantigis RP 30/12/2017

Divenu

El blua lin' vaste kamp' inter vita bel',
Kiun vento klinas al mi tutfluiĝa,
El blua lin' vaste kamp', respond' al ĉiel',
Kaj iĝas mi funde de l'korp' tuttremiĝa.

Divenu

El blua lin' vaste en la retagiĝo,
Longtempe plu restas en ĝi sonĝa nebul',
Kaj de strangaj birdoj timigas flugiĝo,
Kies fore longas ombro de la flugil'.

Divenu

El blua lin' vaste kampo el larmkolor'
Estas lando, kiun nur amo komprenus,
Lando kie ĉio sorĉas kiel odor',
Kvazaŭ en ĝi kisoj ĉiam promenadus.

Divenu

El blua lin' vaste kampo kie miras,
Ĉiam tie vidi, akva pura profund',
Per mantel', ĉu maro, ĉu lago, ĝi kovras
Vivanta miraklo, la ŝultrojn de la mond'.

Divenu

El blua lin' vaste kampa rido, ploro,
En ĝi perde mergas mi, vi ĉu divenas,
Kion tie semis la ĝoj' kaj doloro,
Kaj kial ĝin ami forbate vin ravas ?

Divenu

W. H. AUDEN

Funebra Ve

Haltigu horloĝojn, telefon' formutu,
Ne bleku la hundo, per osto lin nutru,
Silentu pianoj, per obtuza tambur'
Elportu la ĉerkon, venu el plor' dolor'.

Ke aviadiloj muĝe super kapoj
Ĉiele mesaĝon disskribu : Mortis ŝi.
Policistoj metu al si nigrajn gantojn,
Kolombojn publikajn kovru per nigra ŝal'.

Por mi ŝi 'stis nordo, sudo, sub kaj super,
Mia deĵora tag' kaj ripoza vesper',
Tagmezo kaj nokto, kaj parol'; mi kredis
Ke la amo daŭros por ĉiam ; ne veris.

Ne volatas steloj : finforigu ĉiujn ;
La sunon malmuntu, forvojaĝu la lun' !
Forviŝu la maron, forŝiru arbarojn :
El nenio povas veni ia ajn bon'.

JULOS BEAUCARNE

La okuloj

Vidu kiel dolĉe kiel bone
estas, ĉiuj kiel fratoj loĝi kune.
Estas kvazaŭ rara oleo sur kapo fluanta
malsupren sur barbon sur vestokolumojn.
Kvazaŭ roso
malsupreniĝanta el de la montoj.
Tie kuŝas viv' por ĉiam,
tie kuŝas viv' por ĉiam.

La okuloj restadis kontraŭ miaj,
Ili ne volis foriri.
Mi diradis al ili: « iru for! »,
ili restadis
fikse senmovaj.
Tial,
Mi pelis ilin per bastono,
per piedbatoj;
Sed kiam ilin oni forpeladis
oni vidis ilin tuj revenantaj galope,
kaj vidis ilin posteni
kontraŭ la proprajn okulojn,
kontraŭ la propran nazon mian.
Tial mi iris serĉi ajlon,
mi tranĉis cepojn,
kaj mi plorigis ilin !
Sed la okuloj restadis,
enradikiĝintaj kiel plantoj,
Ili nepre ne volis foriri.
Tial,
ĉar mi komprenis, ke
mi ne povos ilin forpeli,
mi lasis ilin eniri en mian domon.
Ili manĝis ĉe mia tablo mian panon,
kaj partigis ĉion, kion mi havis,

kaj ĉefe ĉion,
kion mi ne havis.
Tial,
tiuj okuloj iĝis miaj propraj,
kaj miaj propraj iĝis tiuj.

Vidu, kiel dolĉe, kiel bone
estas ĉiuj kiel fratoj loĝi kune.
Estas kvazaŭ rara oleo sur kapo fluanta
malsupren sur barbon sur vestokolumojn.
Kvazaŭ roso
malsupreniĝanta el de la montoj.
Tie kuŝas viv' por ĉiam,
tie kuŝas viv' por ĉiam.

CHARLES BEAUDELAIRE

Leviĝo

(fragmento)

...

Tiu kies pensoj, kiel la alaŭdoj
Al pura la ĉiel' ekflugas al sore
Kiu sur viv' ŝvebas, kaj aŭdas komprene
La lingvon de l' floroj kaj mutaj la aĵoj.

JOACHIM DU BELLAY

« *Bedaŭroj* » - soneto 13

(*pri versarto*)

De nun pardonas mi al mildaj la flamoj
Kiuĵ forkonsumis plej belajn la jarojn
Sen frukto alia el labora peneg'
Ol vanta distraĵo per tiom longa vag'.

De nun pardonas mi l'agrablan laboron,
Ĉar nur ĝi dormigas la vundantan zorgon,
Ĉar nur ĝi farigas, ke meze de l'venteg'
Mi ne, kiel iam, plu tremas per timeg'.

Se do versoj al mi fuŝis la junaĝon
Versoj al l'maljunaĝ' portos la subtenon.
Ili frenezigis, kaj nun saĝigas min,

Ili vundo estis, nun Aĥilo estos,
Ili venen' estis, skorpie utilos,
La sola kuracil', kiu sanigos min.

LUC BERIMONT

Tranĉilakrigisto

Kvazaŭ rufa hundo septembris en vitoj,
Nuntempe ĉe domo lumeto tremetas.
Jen vento ĵuras deklivojn enblovas,
Razenon truadas la arbaj kalcinoj.

Paŝas sur tegmentoj antaŭtagiĝa pluv'
La nudpieda pluv' sur frostantajn brutojn.
Kaj fenestro kadras migrantajn la birdojn
Remantajn bronzaĵon en la aera griz'

Poste restos al ni pan' kaj neĝo sole,
Padeto glacia malsupre al valo.
Turniĝas kvarventa ĉiel' karusele
Kaj vintro sur grejso akrigas tranĉilon.

ROBERT BURNS

Al muso

ĵus elfosinte ĝin kun ties nesto per la plugo

Ho glima timema besteto,
Kiom da terur' en brusteto !
Ne necesas la urĝfortroto,
Tiom rapidema !
Hontus mi provi je via morto
Per fosil' murdema !

Bedaŭras mi ke l' hom-regado
Iris el natur-kunvivado,
Ke pravas la via timado
Pro danĝerfonto,
Antaŭ mi : kiel vi Ter-ido.
Kiel vi mortonto!

Ja tamen foje nu ŝtelas vi;
Kaj do? Kompatindulin' endas viv'!
En fask' nur spiketo por vi
Ne min damaĝos
Nur la ceter' 'stos beno por mi,
Al mi ne mankos!

Eteta la dom' ruiniĝis,
Senhelpajn murojn vent' forblovis,
Por rekonstruo nenio restas
Eĉ ajna verdaĵ',
Kaj nun ve ventoj decembraĵ venas
Kun akra mordaĵ'!

Vi vidis kampojn nudsenfruktajn
Rapide vintron alvenantan.
Sed sub dolĉa varm' spite la venton

Esperis vivi vi,
Ĝis kraŝ ! Plugkling' kruelanta
El ĝi forigis vin.

Eta ĉi stak' el foli' kaj stoploj
Necesis tiom da mordetadoj,
Loĝo ne restas spite penadojn.
Nek domo nek hejm'
Ŝirmos vin de l' sturmantaj hajloj
Kaj frosta malvarm'.

Sed musĉjo la singardoj viaj
Ne solas rezultiĝi vanaj.
Plejplanadoj kaj musaj kaj homaj
Ofte pereas,
Anstataŭ l' ĝojoj deziritaj
Sufer' nur restas !

Sed benatas vi kompare min,
Ĉar nur la estant' afliktas vin:
Mi tiom memoras el pasint'
Da teruraĵoj.
La estonton: mi ne vidas ĝin,
Sed diven' tremigas !

BLAISE CENDRARS

“sekretaj neeldonitaĵoj”

elĉerpaĵo

Ĉio, kion amas mi kaj en brakoj premas
Cindren iras.

Tion, kion amas mi kaj posedas
Tuj aliĝas al cindro.

Prozo de l'transsiberia vagonaro

elĉerpaĵo

Antaŭsentis mi la venon, de l' granda ruĝa Kristo rusrevolucia² ...
Kaj suno estis fivundita karno
malfermita kiel ardaĵo.
Siberie tondris pafilegoj, militis,
Malsatis, malvarmis, kaj plagis, kaj ĥoleris.
L'akvoj ŝlimaj river-Amur-aj kunfluigis milione putrantajn kadavrojn.

...
Vidis mi en lazaretoj malfermegajn vundojn plensangantaj per
plenorĥestra fort'
Kaj fortranĉitaj membroj dancis ĉien, ekflugante tra malpaca spac'.
Morto en Manĉurio:
Jen nia elŝipejo kaj lasta kaŝloko
Teruras tiu vojaĝ'.

...
Estis mi feliĉega kaj sen zorgoj
Sentis mi, kvazaŭ mi ludis je l'rabistoj
Ni estis ŝtelintaj l'trezoron de Golkond'
Kaj ĝin dank' al Transiberi' kaŝontaj en transan flankon de l'mond'!

...
Mi rekonas ĉiujn landojn fermokule per la arom'
Kaj la trajnojn pere de ili farita bru'
Eŭropaj trajnoj estas kvartaktaj, dum tiuj
En Azio havas da kvin aŭ ses,
Aliaj obtuze iras, lulkantas,
Kaj estas da, kies unutona rado-bruo memorigas al mi l'pezan
prozon de Maeterlinck'

...
Kaj jam estis mi tiom malbona poet'
Ke ne sciis mi iri ĝisfine

...
Tamen estis mi tre malbona poet'

2 La vojaĝo okazis en 1905 dum la Rus-Japana milito.

Ne sciis mi iri ĝisfine;

...

Ĉar estis mi plu tre malbona poet'

Ĉar la mondo preterlimas min

...

Ĉar mi ne scias iri ĝisfine,

Kaj timas.

Mi timas.

Mi ne scias iri ĝisfine.

...

Ĥarbino

Pluen mi ne iros.

Tio estas la lasta stacio.

Mi elvagoniĝis en Ĥarbino dum oni ĵus enflamigis oficojn de l'Ruĝa-Kruco.

...

„Blazio, diru, ĉu vere ni estas forege de Montmartr'?"³

Ĉivespere ĝenegas min granda amo

Kaj malvolonte mensas mi pri l' Jehaneto⁴ de Francio

Dum el tristo vesper' verkis mi ŝiahonoran ĉi poemon.

Johano,

La ĉiesulineto.

Tristas mi, tristas mi

Mi iros al l' „Lerta kuniklo"⁵ por memori perditan mian junecon.

kaj trinki malgrandajn glasojn.

Poste mi rehejmiĝos sole.

3 Montmartr' estas tre konata monteto kaj kvartalo en Parizo.

4 La ĉiesulinon Johano. La aŭtoro literumas Jehano pro memoro de la maniero kiel estis skribita en la 15-a jarcento la nomo de Johano de Arko, franca heroino kaj sanktulino, fakto konata de la ŝatantoj pri malnovaj aferoj.

5 „Lerta Kuniklo“ estis furora spektaklo-trinkejo en Parizo.

FRANCIS COMBES

Ĉu oni povas kalkuli je la popolo ?

Ĉu oni povas fidi la popolon ?
Plej ofte ĝi zorgas pri siaj mastrumaĵoj,
sed ne mastrumas siajn zorgotaĵojn,
kaj lasas sin regi
de tiuj, kiuj ĝin superregas.
La tutan ekonomion funkciigas ĝi
sed ĝi komprenas nenion, ĝi diras, pri ekonomio ;
ĝi estas la plej multa,
sed ĝi ne prigravas ;
ĝi estas la plej forta,
sed ties forto utilas al ĝi nenion.
Kiom ofte ĝi perfidis la esperojn
de tiuj, kiuj kredis je ĝi,
ĉar ĝi mem
ne kredis en si.
Al ĝi multe plaĉas kritiki tiujn, kiuj staras supre
sed ĝenerale ĝi restas malsupre ;
ĝi ne ŝatas la povon,
kaj cetere ĝi ne kaptas ĝin.
La popolo, kiel bone sciatas, memoron ne havas,
ĝi estas ŝanĝiĝema, facilanima
kaj zorgas nur pri amuziĝo.
Kiel povas vi en tiaj kondiĉoj
kalkuli kun la popolo ?
La respondo facilas :
nur kun ĝi
vi povas kalkuli.

CHARLES CROS

(1842-1888)

Estonteco

Papavetoj nigraj, cejanoj velkintaj,
Kiuj meze l'fojno la brutojn ĝueblas,
Flaviĝinta leter', kie ja legeblas
Al mia avino amĵuroj senditaj,

L'tabakujo kien onklo ŝovis nazon,
Ludtablo kie tiom oni triktrakis,
Ravas min. Miaj versoj, kiel konjektis
Mi do, iam ravos vin, ne jam naskiton.

Tamen vivantas mi nun, la vento sendas
La odorojn florajn, kratag- kaj seringajn.
Kisoj pli ol mortosonoriloj bruas.
Estonta leganto ! vivas vi en ĝojoj
Deksesjara de siringoj, kaj de kisoj
Ĝuigas ili miajn ostojn putrintajn.

MARCELINE DESBORDES- VALMORE

Saadiaj rozoj

Mi volis hodiaŭ rozojn porti al vi ;
Sed da tiom kaptis, ke l'plenplenaj zonoj
Krevis pro la pezo de l'fuĝemaj floroj.

La rozoj tuj fluge foriris el la lig',
Per vento al maro ĉiuj flirtiĝintaj
Sur akvo naĝadis, la nerevenontaj.

Ondoj iĝis ruĝaj kvazaŭ flamiĝintaj.
Mia robo sorbis eĥojn odorantajn.
Ties spuron flaru ĉi-vespere sur mi.

ROBERT DESNOS

Kanzono de somera trotuaro

Ni kuŝiĝu sur ŝoseo
Dum sunada varmo, sub la suno feo
Dum ĉi bona polvodoro elleviĝos
De la tago maldeĵora,
Antaŭ l'nokto malaŭrora,
Antaŭ ol l'unua lampo eklumiĝos.
En stratdefluejo ni spegule gvatos,
Kiel nuboj blankaj vatos,
Kiel pompe sango fluos horizonte,
Ĝis la unua stelo supertegmente.

EMILE DESPAX

Ultima

Pluvas, revas
mi. Kaj vidi mi kredas inter arboj
el la malplen-
a loko glima, statuon kaj soklon
el ŝton'. Mia frat'
pasas, diras : 'stas li.

Mia frato vi estos
aminta ĉielon, eĉ pli maron
Mi la librojn, perfektajn versojn, kvietajn tagojn.
Kaj ni estos
tre suferintaj.

EDASSERI GOVINDAN NAIR

(malajala/malajalama lingvo, esperantigita el la angla traduko)

Kiel Diserva Floro (fragmento)

Sed jen ja junvivo sur genuoj miaj
Venis kontentpleni korojn esperplenajn.
Lumo por l'okulo, malvarmeta vento
Almikaresanta, sangoĝojiganta.

Ordonis Vi de l'valo lin levi
Al vasta la supero lin gvidi.
Nu ĉu ligis Vi nin per ĉi ĉener'
Kor-nin-liga nur ke estu sufer'?

Vidi lin 'stis kiel matenruĝa ravo,
Kaj brakumbrio la santalodoro.
Festoplaco vasta al mi is la mondo
Kiomŝance mi 'stis en feliĉolando !

Mang-ekfloroj ! Ve mi l'nevidinto
Nigrajn nubojn de l'nepra estonto.
Meĉon mildan mi flamigis front'al
Ŝtormo kreskiĝanta, stulte, kial?
Mian Paradizon sur sablo mi fondis
Malesperinferon, per manoj, pretigis !

...

Ho Kruelo
Nur
Vi diras eternan veron !
Dankeme ĵetas al Vi mi
Nomon: „Ho kompatema Vi!“
Kiel la diservan floron.
Piedoj Viaj akceptu !

JOSEPH von EICHENDORFF

Lunnokto

Ŝajnis, ke silente l'ĉiel'
kison al l'ter' donis,
ke ŝi meze bril' de l'floroj
ĉiam revos pri li.

Tra kamp' milde spiris aer',
grenoj balanciĝis,
arbaroj sub kares' tremis
de l'sternklarega nokt'.

Kaj anim' mia nun streĉis
flugilojn siajn vaste
kaj flugis tra kampar' silente
kiel al l'lando naska.

PAUL ELUARD

Mia mortintino

En mia ĉagreno nenio 'stas mova,
Mi atendas, neniun venos,
Nek tage nek nokte
Nek iam ajn iom ajn el tio, kio estis mi.

Miaj okuloj disiĝis disde viaj okuloj,
Ili perdas ĉian intereson al ĉio, ili perdas sian lumon,
Mia buŝo disiĝis disde via buŝo,
Mia buŝo disiĝis disde plezuro,
Kaj de la senco de amo, kaj senco de vivo.
Miaj manoj disiĝis disde viaj manoj,
Miaj manoj ellasas ĉion disde si.
Miaj piedoj disiĝis disde viaj piedoj,
Ili ne plu antaŭeniros, ne plu estas vojo,
Ili ne plu spertos mian pezon, nek ripozon.

Sorto mia estis vidi vivon mian finiĝi
Kun via,
Mian en via povo vivon,
Kiun mi kredis senfina.
Por la futuro nura espero mia : mia tombo,
Simila al la via de indiferenta mondo ĉirkaŭŝlosita.
Mi de vi tiom proksimis, ke ĉe aliaj mi malvarmas.

FAÏZ AHMED FAÏZ

Soleco

(urdua, esperantigita el la franca traduko)

Denove paŝbruo,
Ekfloras mia kor'!
Ne, ne estas iu.
Eble vojaĝanto
Malproksimiĝanta ?
Preskaŭ finiĝis la nokto.
Stelfiguroj malaperas.
Malviglaj flamoj de l' palacoj ŝanceliĝas.
La pado, atendado-laca, dormiĝas.
Cetere spurojn de l'paŝoj
Elkovris la polvo.
Mallumigu la lampojn !
Forigu vinon kaj kalikojn !
Ŝlosu la pordojn !
Neniu eniru plu ĉi tie !
Neniu eniru !

LÉON-PAUL FARGUE

Nenia vok' povos niajn vizaĝojn veki.

Longa brak'orstampo glitadas de l'arbalt'
Kaj ekmalleviĝas, kaj en branĉar' tintas,
Premkunas folioj kaj floroj, agorde.
Angvon⁶ vidis mi glitan en vespera l'mildo.
*Dian*⁷ super laĝet' en spegul' maskiĝas.
Spur' el saten' en maldensej' kuras
Kiel penika tuŝ' de l'ĉiel' horizonten.
La boatoj noktaj pretas nun por vetur'.
Aliaj tion vidos dum ekzistos mi ne plu.
Lum' forgesos tiujn, ĝin amintajn tiom.
Nenia vok' povos niajn vizaĝojn veki.
Nia amo sonorigos ne singulton.
Fenestroj niaj ne ellumos plu.
Paro fremda paŝos laŭ l'griza strato.
L'voĉoj,
Voĉoj aliaj kantos, okuloj aliaj larmos
En freŝa dom'.
Finitos ĉio, nenio pardonitos.
Freŝa 'stos afliktad', freŝa 'stos arbaro.
Kaj ĉu eble, iam por freŝaj kolegoj,

Dio donos la feliĉon, kiun al ni li promesis.

6 Angvo : *Anguis fragilis*, malgranda senpieda lacerto, simila je serpento, kiu vivas en folistakoj kaj truoj de la tero.

7 Diano : roma diino, interalie diino de la luno, tial ŝia nomo estas ofte uzata por nomi tiun astron.

ANDRÉ FRÉNAUD

Vivanta memoro de Jozefo F. fiŝisto en Koljur'

Revenante de Koliur'⁸ la tagon plej longan de l' jaro,
tiom malsufiĉa por paroli kun novamiko.
Mallertaj estas ni, viroj, spite la promeson ekvidinta en
l' akvon de l' rigard'.
Fiŝkaptajo tiom proksimas, sed tiom malmulte ni kaptas.
Fuĝemaj riĉaĵoj, kujn interŝanĝi oni ne sukcesas.
Malheligitaj koroj pro tiom da doloraj navigoj
Koroj sekretaj, pli malfacile logeblaj ol fiŝoj.
Vane la marplaŭdoj de l'pasea nokto klopodas reteni
l' vagonaron,
sterniĝanta en malrapida mateno.
Jam tiom malproksimaj de l'ekluma renkonto estas ni.
Forportitaj en la ĉiutagaĵojn, sen certeco reveni.
Sed por ĉiam la rememoro de tiu viro kiel obstina klingo,
en kaŝita loko de l'koro vundos min per vundo,
tia, kia estas rektanimeco,
ekmirinda.

8 France : *Collioures* en Rusiljono)

KONSTANTY ILDEFONS GAŁCZYŃSKI

Balado pri stratoj de Krakovo

(pola, el franca traduko)

(fragmentoj)

Fratinoj miaj, stratoj,
jen amodeklaro;
Mia neĝo, mia krudvento, mia pluvo,
Mia ununura patrujo estas vi.
Neĝo bonodoras tiel, kiel lilio,
kaj vino pluvas en pluvo,
kaj mi en mallum' aŭdas paŝi
tiun 20-an jarcenton freneziĝantan .

...

Miaj fratinaj stratoj,
jen tio estas mia amdeklaro,
lunofreŝaj nokte,
sunebriaĵe tage.
Kiu scipovus luli nin senforlase,
nin instigi milde al rev"
nin mallaŭtenoreli kaŝe
"Ne ploru ja frato, ne ploru"?

WOLFGANG GOETHE

Super ĉiaj suproj
Kvietas
Inter ĉiuj branĉoj
Eksentas
Ne eĉ spiron vi
Birdetoj silentas en arbar'
Nur atendu: baldaŭ
Ankaŭ ripozos vi!

PAUL GRAVOLLET

Ĉe l'bord' de l'kvieta lago
Venadas aŭskulti mi
La voĉon nedireblegan,
Kiu alparolas kun mild'.
Memor' de l'amika voĉo
Sonoras ĉiam en kor'
Kun l'mildkara gracio
Amita ĉe fratin'.
Revado ĉiam en ĉio
Obtuzas min en lul'.

Respegul' ora de l'steloj
Vidatas kristale en akv',
Nebul' envolvas en vualoj
For tie la rokojn de insul'.
La horo 'stas la plej rava,
Langvoron eligas ĉiel'
Kaj ondo la misterhava
La kanton lulantan diris.
Revade mi emocie
Dormiĝas en la mild'.

NATHALIE HETRU

La sep sunoj verdaj

Ni vivas premitaj
Kun l'okul' en nuboj,
Kaj buŝo en stelar'.
Ni falas, teditaj de l'vivo,
En fatalaj la manoj de l'morto,
Vagadas ni tra temponokt'.

Vi vin kroĉas je ŝi,
Kiu vin protektis,
Sed banas vi en sango.

Okuloj viaj rigidiĝis
Kaj okuloj miaj estingiĝis
Neniam pli ol rigardoj estas ni,
Rigardoj mortontaj en la nokt'.
Gestoj niaj malaperas en neniecon ;
Vivoj niaj miksiĝas unu kun la alia,
Sin brakumas en perdita tiu tempo.
El okuloj niaj elfluas fluejoj,
Kiu akvumos per pesimismo
Niajn ontajn infanojn.
Ni paŝas al pordoj estontaj
Neniam retrorigardante,
Morton en l'animo.
En nebula maten' frosta vintre
Jen vi tenis min permane.
Mi revas je tiuj strangaj planedoj turniĝaj,
Je ideala viv', kiun neniam mi vivos,
Je krepusko antaŭdiranta amornokton.
Kaj nokto revenis
Ĉiam pli malvarma.

VICTOR HUGO

Morgaŭ, ĉe l'hor', kiam ekhelos kampar'
Iros mi. Scias mi ja, ke atendas vi.
Iros tra la arbar', iros tra la montar',
Pli longe for de vi ja kapablas ne mi.

Mi paŝados, la okulojn rigardantajn al pens',
Vidante nenion eksteran, aŭdante ne,
Sola nekonato, manojn ĉe l'sinka dors',
Trista, kaj tag' al mi estos malluma nokt'.

Nek rigardos l'oron de l'versperĉiela fund'
Nek velojn , al Harfleur naĝantajn en la for',
Kaj, finalveninte, metos viatomben
Ileksajn verdaĵojn kaj erikajn florojn.

FRANCIS JAMMES

Ĝis morgaŭ sumos jar'

Ĝis morgaŭ sumos jar' : en Odaŭ mi plukis
tiujn florojn - l'herbej' - pri kiuj mi diris.
Hodiaŭ 'stas plej bela el Paskotagoj.
Enprofundiĝis mi en bluaĵ' de kampar',
tra boskoj, paŝtejoj, tra kampoj.
Kial, koro ! de unu jar' vi ne mortis ?
Al mia kor' martiriĝon mi retrudis :
l'vilaĝon revidi, kie sufer' trois.
Antaŭ pastrodomoj floris rozoj sangaj,
murdas min siringoj meze bedoj tristaj.
El memor' revivis l'malnova malesper',
kaj mi ne komprenas kial mi ne falis
sur la okran padon, la frunto en polvon.
Nenio plu 'stas al mi, nenia subten'.
Kial belas veter' ? Kial mi naskiĝis?
Se mi povus meti sur genuojn viajn
Animon lacrompan tiel kuŝiĝinta,
kiel mizerulo en fosaĵ' vojflanka.
Dormi, dormi povi, dormi por eterne
sub la pluvoj bluaj, sub la freŝaj tondroj.
Ne plu senti. Ne plu koni vian eston.
Ne vidi ĉielon gluti la montetojn
en blua sven' el gutoj kaj aer', ne plu
en malpleno vane serĉi eston vian.
Mi sentas plorantan enfunde de anim',
per muta singulto iun ne estantan.
Mi verkas, kaj kampar' sonoras je ĝojo.
« Ŝi estis en herbej' malsuprenpaŝanta,
kaj herbejsimile ŝi 'stis tutfloranta."
Nenio plu 'stas al mi, nenia subten'.

Kompatinda bovo, kiu aŭskultadis grilojn

Bovoj kial trenas oldajn pezajn ĉarojn ?
Kompatigas vidi tiujn dikajn fruntojn,
la okulojn kvazaŭ sinkajn el sufero.

Per ili pervivas l'kompatindaj kultivistoj.
Ĉe malsan' bruligas ilin bestokuracistoj

per kaŭteroj, ke reiru ili en la
kampojn per papavetoj ruĝajn, por erpi,
por denove relabori, teron skrap

Se rompiĝas kruro, tiam venas la buĉisto...
Kompatinda bovo, kiu aŭskultadis l'grilojn

kaj obeis ĉiam je la akraj voĉoj
kampanaj sub la furiozaj sunoj,
kompatinda bovo iranta sen scii.

KONSTANTINOS KAVAFIS

(greka, poemoj esperantigitaj el franca traduko)

Ambasadoroj el Aleksandrio

De jarcentoj ne estis viditaj en Delfo tiom riĉaj
oferdonoj kiom tiuj de la du Ptolemoj, la du reĝoj, la du
konkurantaj fratoj. Sed la pastroj, kiuj ilin ricevis,
maltrankviliĝas. Sian tutan sperton ili bezonegos por
verki kun sagaco la al ili petitan orakolon. Kiun inter la
du fratoj preferindas malkontentigi ? La pastroj
kunsidas nokte kaj sekrete, ili diskutas aferojn de
l'Lagid-aj familioj.

Sed reaperas la ambasadoroj. Ili reiras Aleksandriion,
ili diras; ili nur adiaŭas kaj neniun plu oraklon petas. La
pastroj ĝojas, la riĉajn donacojn cetere ili konservas.
Sed tre scivoligita, ne kompreninte el kio venas tiu
subita malinteresiĝo. Ignoras ili, ke hieraŭ, seriozaj
novaĵoj atingis la ambasadorojn. Oraklo estis metita en
Romo. La disdono estis farita tie.

Reĝo Demetrio

Post kiam la Makedonoj forlasis lin, evidentigante, ke ili preferis Pirrhuson, reĝo Demetrio (li estis altanima !) tute ne kondutis, kiel oni tiam diris, kiel reĝo. Li iris demeti siajn orajn vestaĵojn, li ĵetis for siajn ŝuojn elpurpurkoloritajn ; li surmetis tre simplan vestaron, kaj fuĝis. Li faris tion kiel aktoro, kiu fininte la prezentadon ŝanĝas la kostumon, kaj foriras.

Depost la naŭa vespere

Noktomezo kaj duono. Tempo fluis depost, kiam je la naŭa mi bruligis mian lampon kaj lokiĝis ĉi-tie. Mi sidis sen legi, sen paroli. Kun kiu mi parolu sola en tiu domo?

Depost kiam je la naŭa mi revivigis mian lampon, bildo de mia korpo juna fantaziiĝis al mi, kaj tiu de varmetaj parumitaj ĉambroj, kaj de intaj voluptoj. Kiom aŭdacaj la voluptoj ! Kaj mi revidis stratojn, kies aspekto tute ŝanĝiĝis, ejojn viglecplenajn, kies ekzisto ĉesis, teatrojn kaj kafejojn forpasintajn.

La bildo de mia korpo juna aperis al mi, kaj ankaŭ memorigis afliktajn rememorojn : familiaj mortoj, disiĝoj, sentoj familianaj, volo de l'mortintoj kiujn tiom oni preteratentis.

Noktomezo kaj duono. Kiom forflugas tempo !

Noktomezo kaj duono. Kiom foriĝas jaroj !

La Trojanoj

Malfeliĉaj ni estas ! Niaj klopodoj similas la vanajn elsturmojn de la Trojanoj. Ni gajnas iom. Ni rekonfidiĝas iom. Kuraĝo kaj belaj esperoj ree venas en nin.

Sed ĉiufoje neantaŭvidita fakto okazas, kaj haltigas nin: Aĥilo ekvidiĝas sur rando de l' fosaĵoj, kaj nin terurigas per siaj laŭtaj krioj.

Niaj klopodoj similas tiujn de la Trojanoj: Kredas ni fordirekti batojn de l'sorto per la peno de nia decidemo kaj kuraĝo. Kaj ni staradas ekster la muroj, batalpretaj. Sed ĉe la decidiga momento, nia kuraĝo kaj decidemo mortas. Nia animo konsterniĝas, malaplombiĝas kaj ni, turniĝante ĉirkaŭ la muregoj, serĉas savon per fuĝo. Pereo nia tamen nepras. Sur remparoj jam veadoj sonoras. Niaj memoroj kaj pasintaj emocioj ekfunebras. Funebre Hekubo kaj Priamo veploras por ni.

La urbo

Vi diras : “Iros mi aliajn landojn, aliajn bordojn. Finfine ja mi trovos urbon alian, pli bonan ol tiu ĉi, kie ĉiaj miaj provoj estas deantaŭ kondamnitaj fiaski, kie mia kor’ enfositas tiel, kiel mortinto. Ĝis kiam restos mia menso en ĉi marasmo? Kien ajn mi turnas min, al kie ajn mi rigardas, mi tie vidas ruinojn de mia vivo, tiu viv’, kiun mi fuŝadis kaj malŝparadis dum tiom da jaroj. “

Vi ne trovos novajn landojn, vi ne malkovros novajn bordojn. Sekvados vin la urbo. Vi ĉirkaŭvagos la samajn stratojn, vi maljuniĝos en la samaj kvartaloj, kaj viaj haroj blankiĝos en la samaj domoj. Kien ajn vi iros, vi elŝipiĝos en tiun saman urbon. Por vi ekzistas nek ŝipo nek vojo, kiu povus venigi vin aliloken.

Esperu nenion. Vi fuŝis vian vivon en la tuta mondo tiom, kiom vi fuŝis ĝin en tiu malgranda terpeco.

PATRICE DE LA TOUR DU PIN

Loĝatejoj

Pluvo ... kaj atendo sur l'altaĵoj,
Senĝojmorna ĉiel' tralavata ;
Senĝojmorna ĉiel' ĝis plejintimaĵoj,
En korfundo l'plej malalta.

Altenpaŝi ŝtele ĝis al kresto,
Iri ĝis l'enombraj loĝatejoj.
Ekas jene kiel agord' al festo:
Pornokta eklumo lanternuojn.

Vidi helon el fenestro brili,
Jene rido el infan' dormonta,
Kaj proksima de l'mond' antaŭ ol foriri,
Al la fea ĉiel' dezirota.

La infanoj dormontaj aŭdiĝas
Plej milde ; certe ili flugis ;
Noktajn formojn la vent' eksterdome svingas
Svagajn : jene vento ankaŭ fuĝis.

Kaj perdiĝas mole en abismojn
De morna ĉiel' tralavata,
Senĝojmorna ĉiel' ĝis plej intimaĵoj,
En korfundo l'plej malalta.

VALERY-LARBAUD

Skeveningo mortsezone

En l'hela trinkejo kun vaksitaj mebloj
Longtempe ni trinkis el anglaj drinkaĵoj,
Intim-varmis la lok' sub fermaj kurtenoj,
Ekstere tremadis pro l'marvento seĝoj.

Kvazaŭis fumĉambron de ŝip' aŭ vagonan,
Mia kor' premiĝis kiel envojaĝe,
Mi 'stis molkore for, la menson tutmildan,
Mi 'stis kiel infan' angorplena saĝe.

Tamen kvietis ĉio ĉirkaŭe de ni
Homoj ĉe l'startrinkej' ade konfidencis
Kiom etas, kiom genuiĝas, foje ni
Pro senti vin ĉeaj ho ondoj vastegaj!

LI JU

ĉine : 李煜

https://eo.wikipedia.org/wiki/Li_Ju

Cio laŭ melodio de "La ĝojo sinrevidi"

tiu formo konsistas en la ĉina el sep versoj de 6,3,9,3,3,3,9 silaboj , kun rimaranĝo aaabbaa.

(esperantigo el la franca traduko)

Silentula solecŭla mi surŝtupas al okcidenta altano

Falĉileta 'stas luno

Profunkorte mez paŭlovnioj solecŝlosas min aŭtuno

Penso : netranĉebla faden'

Kiel maltaŭzi ĝin !

Disiĝodoloro

Strange bongustas vi en la koro

FRANÇOIS DE MALHERBE

(eltiraĵo)

Nu ! kiel deserton jupon suprentiru,
Urĝe ! ĉemiz', ĉio, ke nenio restu,
Kiu eble malhelpus min vidi bone
Supren ĝis umbilik' malsupren ĝispube

OSCAR MILOSZ

Kaleŝo staranta ĉe nokto.

Atendante

Je l'ŝlosiloj

- li serĉadas ilin certe inter vestoj

De Theklo mortinta antaŭ tridek jaroj –

Vi aŭdu, Sinjorino, al malnova al obtuza flustro nokta

De l'aleo...

Tiom malgrandan, malfortan, knabinetan dufalde envolvitan en mantelon mian

Portos mi vin tra la rubusujoj tra la urtikejoj de l'ruinaĵoj ĝis la alta nigra pordo

De l'kastelo.

Tiel la praavo en l'iamo venis hejmen ree de Verĉelli

Kun la mortintino.

Kia domo muta, malfidema, malhelega

Por infanino mia !

Tion vi jam scias, Sinjorino, tristas la rakonto.

Ili ĉiuj dormas dissemataj en la foraj landoj.

Iliaj post cent jaroj lokoj atendas

Meze la monteton.

Per mi ilia idar' estiginĝas.

Ho vi reĝino ĉiruinaĵa !

Ni vidontas la belan dormoĉambron de l'infanaĝ' : tie

La supernatura profundec' de l'silent'

Estas la voĉ' de l'malhelaj portretoj.

Kuntirita sur mia lit' dum nokto

Mi aŭdadis, kiel en kavo de armaĵo

Mez' la bruon de l'dipeciĝanta glacio malfrostanta post la muroj

Ilian koron bati.

Al infan' timema, kiel patruj' sovaĝas!

Estingiĝas lantern', luno forvualiĝas,

La turstrigo al idaro en veprejo vokas.

La ŝlosilojn atendante

Vi dormu iom, Sinjorin'. – Dormu, kompatinda etul' dormu

Palega, kun la kapo sur mia ŝultro.

Vi ja vidos kiom l'sopirstreĉa arbar'
Belas dum maldormoj la juniaj,
Ornamita per florkronoj, infanino mia ! kiel la filino preferata
De l'reĝino freneza.
Vi envolvu vin en mian vojaĝsurtuton :
La granda aŭtuna neĝ' sur viaj vangoj fandiĝas
Kaj dormemas vi.
Por timema infanin' tiom nigra domo !
Fundfunde, fundfunde de l'Litova lando.
Ne, ne sinjorino, nenion aŭdas mi.
Ĉiuj servistoj mortis,
Kaj mi la memoron perdis.
Por infano fida tiom nigra domo !
Nur pri l'forcejo
De l'prapraavo, kaj teatro, mi memoras.
Orelstrigidoj tie manĝis en mia mano
La lun' alrigardis tra l'jasmeno ;
Is la tempo.
Paŝobruon mi aŭdas de l'fund' de l'aleo.
Ombron. Jen as Vitold' kun ŝlosilo.

CHRISTIAN MORGENSTERN

Estetika putoro

Ĉasputoro
sidis foje sur ŝtonero
mez la akvoj de rivero.
Ĉu scias ci
kial ?
La bovid' en la lun'
malkaŝis ĝin al mi
dum silent' :
La delikatkus-
ta best'
faris tion pro la rimo !

~

La preĝo

Cervidetoj nokte preĝas.
Ekas!
Jen la oka !
Ek la naŭa !
Ek la deka !
Kaj meznokta !
Dek-
dua !
Cervidetoj nokte preĝas.
Ekas!
Piedfingretojn milde faldas
cervidetoj.

WILHELM MÜLLER

La Tilio

Tili' ombrigas laŭba
Fontanon antaŭ la urb';
Tiomajn dolĉajn revojn.
Mi revis sub ĝia ombr'
Tiomajn dolĉajn vortojn
Mi ĉizis en ĝia ŝel'.
Malĝojan aŭ ĝojan logas
Ĝi min al si la arb',
Ĝi min al si la arb'.

Mi migri for nun devas
En nokta profunda nigr';
Dum ĉio malvidiĝas,
Okulojn fermas mi.
Susuris folioj ĝiaj
Al mi kiel per alvok'
-“Vi venu min amiko!
Ĉi tie sidas feliĉ',
Ĉi tie sidas feliĉ' !”

Venteg' malvarma blovis
Al mi kontraŭ la frunt'.
L'ĉapel' de l'kap' forflugis ;
Pri tiu mi ne returnis.
Tiomajn horojn marŝis
Nun mi de tie for;
Kaj plu mi aŭdas susuri:
-“Ja tie sidis feliĉ'
Ja tie sidis feliĉ'“

ALFRED DE MUSSET

(eltiraĵo)

Pala vespera stel', fora alvenanto,
Kies frunt' leviĝas de l'vespera vual',
El palac' ĉiela pro kia do kial'
Vi pririgardas sur kampo ?

Foriĝas ventego, kvietiĝis aer',
Tremanta l'arbaro sur eriko ploras,
Falen' orflugila flirtafluge traas
En bonodora la herbej'.

Vi do kion serĉas super dormanta ter'?
Sed jam al montoj for jen vi malleviĝas,
Vi ridete fuĝas, amikin' trista plej,
Via rigard' trema baldaŭ forviŝiĝos.

Stelo subiranta ĉe verda monteto,
Malgaja brodita larmo sur nokta sin' !
Kiun fiksrigardas iranta paŝtisto
Dum popaŝe l'vico de gregar' sekvas lin.

Ho kien iras vi, en nokton senliman ?
Ĉu serĉas vi sur bord' en kanoj al kuŝej' ?
Kien iras bela, la horon silentan,
Fali kiel perlo en fundon de akveĵ' ?

Ha ! se via kapo, belo, se vi mortu
Mergos la hararon al vasta la maro,
Antaŭ ol lasi nin nur momenton haltu!
Ne disas de ĉiel', stelo de la amo!

TASLIMA NASRIN

(bengala - esperantigita el la angla traduko)

La nesonorinta sonoro

Tiom da aĵoj
sonoras.
Ĉeloj de l'korpo, sonoriletoj
ĉe l'maleoloj dancantaj,
ĉe l'manartikoj l'elargenta brakringaro.
ĉe falo de l'musonaj pluvoj sur fenestro
muzike la vitraĵoj sonoras;
kiam kunpuŝiĝas nubo kun nubo
sonoras l'tondro.
Revoj sonoras, kunigantaj siajn ritmojn, kaj
interne ruinigon rezultanta
la soleco sonoras.

Nur iu intima sonorilo sur mia pordo
ne sonoras.

KAZI NAZRUL ISLAM

Katenitaj

(verkita dum malliberigo pro politikaj agadoj cele liberigon de Hindio)

(bengala, el la franca traduko)

Se ni sidas katenitaj,
Sciu vi ke tio estas ruzo
Cele pli bone rompi la katenojn.
Vi kredas, ke vi enŝlosis nin
En karcerojn de viaj malliberejoj.
Sed niaj koroj ŝtele
komplotas nian liberigon.
Ni estas malliberigitaj ĉi tie, fratoj,
Por ke finiĝu la katenteroro.
Tion mi diras plenvere al vi ĉiuj,
Tiuj piedoj niaj, kiujn oni ligis
Estas nenio alia ol la militilo,
Kiu frakasos la katenojn de l' popolo !"

Kontraŭ rigard' mia ne plu ridas rozoj

(el la angla traduko)

Kontraŭ rigard' mia ne plu ridas rozoj,
Je muzik' miaparola ne plu alfloras floroj.

Kion utilas al festo iri
Kun el ridetoj velkanta girland'?
Ĉu povas al nokt' la harar' nigri
Ne rigardinte al lun' kun avid' ?

Suda vent' tamen printempon alportas,
Sed en ĝarden' ne plu kantas najtingal',
Nek sovaĝa floro plu dancas
En arbar' rigardante luno al.

Io perditis, io mankas, mia kor'
Malplena kaj maljuna sentiĝas.
Pro kia kruela tuŝ' en tiu hor'
Aĥ mia kor' tiom frostiĝintas !

Ŝtelistoj kaj rabistoj

Kiu ŝtelist' nomas vin ? amik', kiu rabist' ?
Ĉie ŝtelistoj marŝas, kaj regas rabistoj
Ĉu ia Daniel' juĝos al ŝtelistoj
Ĉu iu ajn sur ter' ne estas ekpluatist' ?

Plejalta juĝ' tenu sceptron ! ĉar granduloj
Nur pro ŝtelinte malfortulojn grandas.
Ju pli vastas la ŝtel', ekpluato friponas,
Des pli altas status' de l'modernaj regnoj.

Kreskas palacoj el seka sang' de subpremataj gentoj,
Profitojn altigas kapitalistoj detruante hejmojn,
Kia fiinfera maŝin' estas ĝi nutrita per homa karn' ?
Vivaj gevoj enen, eleniĝas rekrementa sukerkan'

Uzinoj elpremas el miloj da homoj la homecon,
Por al milionuloj plenigi vinglasojn kaj orkestojn
Uzuriston dikventrigas manĝ' bezona je l'malsataj
Posedanto ruinigas hejmojn por akiri la kaleŝon.

Negoca pens', faris de l'mond' prostituejon
Malico kaj Malbon' kiel servilaj sklavo
Pokaltenante kantas kanton de avidoj
Homo perdis manĝon sanon vivon esperon

Kaj parolrajton, bankrotinta kuras li
Al nepra detruig'. Ne videblas eskapvojo,
Ĉar ĉirkaŭe fosaĵojn instalas monavido.
La tuta mond' 'stas karcero, ŝtelistoj ties provoso.

Ŝtelistoj al ŝtelist' svatiĝas,
Friponoj inter fi fratiĝas
Kiu ŝtelist' nomas vin ? amik', diras, ke vi ŝtelis ?
Nur kelkajn monerojn, rizbovlojn vi prenis.

Sed ne ponardon vi ŝovis en homkoron

Ne malhoma estas vi kvankam ŝtelist'
Kiel Ratnakaro vi povas iĝi Valmik'⁹
Se nur renkonti veran homon.

9 Valmiki, la aŭtoro de fama epopeo Ramajano , nomiĝis fakte Ratnakaro kaj estis rabisto, legendo rakontas pri lia renkonto kun saĝo Narado post kio li mem fariĝis saĝo.

MARIA NICOLINI

Fokusiĝo

Unu el la sennombraj galaksioj en la tutuniversa nemezureblo.
Apenaŭ videbla stelo, certa suno, ie en la galaksio.
Planedo laŭ elipso orbitadanta ĉirkaŭ tiu ĉi suno,
Kontinent' el malvarmiĝinta krust' de l'planed'.
Fruktdona grundo-pec' de tiu kontinent'.
Iom da tero, el tio ĝardeno.
Domo meze de la ĝarden'.
Viro ie en tiu domo.
Skribas leteron.

GEO NORGE

Krimo kaj puno

Kiam oni pridemandis lin,
Li estis preninta la kutimon ne respondi,
Kaj mienis simple kiel
Kokino ovon demetonta.
Kaj kiam oni akuzis lin,
Li estis preninta la kutimon ne defendi sin,
Kaj mienis simple kiel,
Iu sub kiu la tero estas fendiĝonta.

Atendo

La pordo pezis:
Post duonhoroj
Li atendadis
(bovid' !,balan' !).
Tiom da tagoj
Horoj daŭradis
(stultul' malsprita !).
Meze hunda veter',
Dum noktoj pri lup'
Jarojn kaj jarojn
Li tie staris
Vintre, somere
(kia ŝarĝbruto!).

Kion remaĉas li
Dum tiom da temp'
Kun piedoj en flak''
Kaj strebanta kor' ?
Diru Stanislas
Kial enuegas

Vi antaŭ tiu
Senenirejo ?
Sed li tenere
Kaj plenespere :
“atendas mi scii,
Kio atendendas!”.

Malamikoj

Ja estas vi el alia loĝar':
Vi ne havas la samajn sabotojn !
Sur la ŝultro vi havas plumetojn
Sur la nia estas lanburnusar'.

Ni por fromaĝ' uzas saman lakton,
Sed tio donas malsamajn gustojn.
Vi ne havas la samajn sabotojn,
Vi fik'-eligas malsaman takton.

Eĉ skuante niajn ilskatolojn
Vi fik'-eligas malsaman takton.
Kaj jen, nu, aŭd' de viaj lingvaĵoj
Nervozigas tio nian cerbon.

Jes, ni diras : la via salivad'
Via sup', kiu faras bobelojn
Via kurad' kaj via tatuad'
Nervozigas ili niajn cerbojn.

Vi ne estas el la nia loĝaĵ'.
Jes ni diras : la via salivaĵ'
Al ni nepre ne plu elporteblos.
Do nur restos la interbatalaĵ',
Ni buldoze nepre interdraŝos.

FALO DE DIINO

Puf ! is fala ! granda l'idolata.
Tiom ŝi belis, kaj dorlotatis ;
Puf ! falis en unu ŝutolata.

En siajn skoriojn, siajn forbalaĵojn
Kazojn, okazojn, rekvizitojn
Puf ! as plata, kiel pilko krevinta.

Orgenoj ja povus kviviti.
Olibanoj ja povus bruleti.
Spiritanoj ja povus li--lispi.

Puf ! as plata, kiel pilko krevinta.

Devintus ŝi ne tiom ŝajnigi,
Devintus ŝi ne nin elsangi,
Necesadis kor' , ver' , agi,

Ne plu havis da, ne havis da.
'Stis nur fripone kaj babila.
Ja falis ! Puf ! as tutplata.

Sako Maliceta

Vitroglobetoj, du,
Paseroplumoj,
Poŝhorloĝa ŝlosileto, malnova,
Krajonstumpoj, ŝnureteroj,
Alumetpecoj, ĉiaj stumpoj,
Ringo el plumbo,
Du elastaĵoj, etpenikoj, sekurpinglo,
Domeno, poŝspegulo, ŝraŭbingo, du glumarkoj,
Tio estas tiaj aferoj en Sako Maliceta.
Kaj nenio pli ?
Jes ! Kerodamo, kaj fino!

Sed ili kuŝas meze scivolemula semo.

MANUEL DE NOVAS

Rajto naskiĝi

Panj' en via ventr'
Min donu rajton naskiĝi.
Paĉjo naskitan
Min donu rajton je vivi.

Igu ke l'hejm'
'Stu plej ravega lok' en mond',
Ke l'infanec'
Estu ĝardeno da feliĉ'.

Min helpu kreski
Per tuta am' kaj bonkorec',
Min donu vian amon teneran
Panjo amata don' de Di'

La sanktan mamon donu
Panjo amata,
La helpon bene donu
Paĉjo amata.

Helpu min vivi iluziojn,
miajn fantaziojn,
Mi via flor' revolucia,
Mi via frukto el ĝojo.

NGUYỄN TRÃI

(vjetnama, el la franca traduko)

Al amiko

Malriĉan, malsanan, plendas vin mi.
Originaluloj, nu ambaŭ ni,
Tramigradis ni milojn da lioj,
Fervorlegis ni dekojn da libroj.
Malstabilanimaj kion ni faru
Krom vojaĝi, ke ni tre plezuru ?

PAO ĈAO

ĉine 鮑照

ĉina, el franca traduko poemo n-ro 4 el lia serio da Jue-Fu (ĉina poema ĝenro)

„Vojaĝosuferoj“

Verŝitan neniun reteni povas akvon
Fluas ĝi, vidu vi.
Same tagojn, jarojn. tempo prenas kun si
Finiĝontan vivon

Mian. Ĉu ĉiupaŝe ĝemi, plori – eble ?
Tim' en ĉiu horo ?
Ne povas ne ĝui mia karna koro,
Tamen plezureble.

Trinku ni ! ĉi vino pri montoj revigas
per subtila sorĉo,
Kaj ni morgaŭ povos... sed ne, mia voĉo
pludiri ne povas.

CATHERINE PAYSAN

Kial ŝatas mi nebulon

Dankas mi precipe nebulon,
El lasta horo providenca.
En nebul' solviĝas la muroj,
La mond-aflikto iĝas falsa,
L'angoro diserinta ŝtono
Kaj nepermesitas sufero.

Ĉiu reiĝas fantomon, al
Si mortas, bona reestiĝas.
Ĉiu voj' iratas pantofle.
Troo da mildo anheligas,
Siluetoj monstraj tusas,
Kaj la nebulo 'stas sorĉisto,
Kiu elsîras el la ventro
Ilian pezan fianimon.

Dank' al Di' ! ĝin havos ni ĉiam
Por nin trudi al iom da am'.

JEAN PEROL

Demandoturmentejo

Ili al mi enŝovis en la gorĝo funelon
kie senĉese fluas tuta tiu spaco nigra
tiuj Jupiteroj steloj galaksioj
tiu eknaŭzo de la balanciloj
tiu trinkaĉ' da kirloj kaj perihelioj
tangad' peza de l' freneziĝantaj planedoj.

Mi estas ŝnurligita sur la tablo tera
en malhel' de l' kelaj ĉambregoj de l' nokto
trudkuŝigita sur l' glueca tablo de l' ter'
per tiom da ligoj de l' viv' kiujn tiom da mortintoj
en la karnon mem enfiksis je l' anguloj de l' korp'
kontraŭ ligiloj mi baraktas sed ankaŭ vi
al vi ĉio vanas vi kiel mi estas
plenfelsako da sang' kaj sengusta senlim'

SAINT-JOHN PERSE

(elĉerpaĵoj)

....

Mia ĉeval' haltinta sub la arbo kveroplana, mi fajfas fajfadon eĉ pli puran

Kaj pacon al tiuj, kiuj nun mortos, ne vidintaj tagon ĉi.

Sed pri mia frato l'poemisto, informojn ni ricevis. Plian li verkis aĵon plej dolĉan. Kaj estis homoj, kiuj legis ĝin.

(en « Kanzono »)

**

Vi 'stas kuracinto, asociinto, kaj sorĉinto je la altaj fontoj mensaj !
Ĉar ĉia kapablo en homa la koro strangas, kaj grandas alirfacilo al
inter ni via : trealogema homo ! kun cent kutimoj inter ni, ho
disigitulo ! Ni la stampon de via rigard' surhavas ĉiuj sur la frunt' !

(en « Amikeco de l'Princ' »)

**

Multaj aĵoj surteraj kaj por aŭdi, kaj por vidi, aĵoj inter ni vivantaj.

Tioma mildo en la homa koro, kial povas esti, ke mankas al ĝi, ke ĝi
alĝustiĝu ? ...

(en « Anabazo »)

Agroj de l' rev'. Pri domkonstruo ni ne parolu !

(en « Anabazo »)

Kreskantaj ili estis grandaj fortoj sur ĉiu fac' de ĉi mondo, kaj kiuj
naskiĝis pli alte ol en niaj kantoj, en lokoj de insult' kaj malkonsent',
kaj kiuj libere sin regalis inter la mond', ho tutaĵa mondo de la aĵoj !
Kaj kiuj vivis sur la firstoj de l' futuro kvazaŭ ĉe l' argilaj flankoj de l'

potisto.
(en « Anabazo »)

**

Mi foriros kun anseroj en la sobra odor' de l'maten'.
(en « Ventoj »)

**

Mi iras ho memor' ! je paŝo de viro libera, senhorda, sentriba, mez
la kanto de sablhorloĝoj kaj, kun frunto nuda laŭrkronita per abeloj
el fosforo, malsupre de ĉiel' tre vasta, verdŝtala kiel en marfundo,
fajfvokante mian genton el Sibiloj, fajvokante mian genton el
nekreduloj, mi dorlotas plu, reve, per mano, inter tiom da estaĵoj
nevideblaj,
mian hundinon en Eŭropo, kiu estis blanka kaj, pli ol mi, poet'.
(en « Ekziloj » - verkita dum ekzilo en Nov-Jorko
pro la 2a mondmilito)

**

Kaj poste venis neĝoj, unuaj la neĝoj dum foresto, sur vastaj la
larĝoj veftitaj de rev' kaj realo ; kaj je ĉia sufer' indulgitas homoj
memoremaj, ekestis freŝo tolaĵa sur la tempioj niaj. Kaj estis je
l'maten', sub ĉiel' griza l'frumatena, iom antaŭ la sesa hor', kiel en
refuĝa haven', ejo el graco kaj el danko kie liberigi l'svarmon de la
grandaj odoj de l' silent'.
(en „Neĝoj“)

Poezio por akompani iron de recitmarŝo honore al l'maro. Poeziaĵo
por subteni kanton dummarŝan tutĉirkaŭ lime la maron. Tiel, kiel la
ago de la altar-ĉirkaŭiro, aŭ la orbitado de ĥoro dum disfaldado de
l'strofo.
Kaj tio estas mara kanto tia, kia neniam estis tia kantata, kaj estas
la ennia maro, kiu ĝin kantos.

(en « Maraj gvidpunktoj »)

Ha ! Ne estu al mi mastro dura per silento kaj malĉeest' :
Direkttilisto tre kapabla, amoristo tro zorgema ! Havu havu por mi pli ol memdonecon. Ĉu amanto vi ne amos ankaŭ esti la amato ?...
Timas mi, kaj maltrankvilo sidas sub mia brusto. Foje la koro de l'viro foren iras kaj sub la okularko videblas kiel desub la grandaj solecaj arkaĵoj tiu tregranda ampleksaĵo de la maro stare je la pordoj de l'dezerto.

.....

Vi striktigos la stringadojn viamanajn sur miaj manradikoj amantinaj, kaj manradikoj miaj estos inter viaj kiel la atletaj inter siaj ledobendoj. Miajn brakojn vi kondukos kunajn ĝis trans mia frunto ; kaj ni kunigos ankaŭ niajn fruntojn, kiel por la plenumo ni du de aferoj grandaj sur l'areno, grandaferoj cele al mar', kaj mi mem estos via homamaso en la aren' el inter l'faŭno de viaj dioj.

.....

Tiu, kiu en la nokt' superpasas la miakorpan dunon por iri nudkape rigarde pridemandi Marson ruĝantan kaj fortan tian, kia naviglumo sur la maro, mi diras, ke li ne havas de virino uzon nek zorgon....
(en « Maraj gvidpunktoj », la tri eltiraĵoj el la parto « STRETAJ ESTAS ŜIPOJ STRETA NIA LITO »)

Funebraodoro de l' rozo ne sieĝos plu kradojn de l'tombo. Vivanta la horo inter palmoj ne mutigos plu sian animon fremdecan. Amaraj, ĉu tiel iam estis niaj vivantulaj lipoj ?
(en « Maraj gvidpunktoj »)

POEMO PO SEKVO

(Tio estis konkurso direktita al francaj lernejoj, la poeto SERGE PEY verkis poemkomencon, kaj oni petis al la lernejoj elpensi sekvon. La ideo plaĉis al mi, kaj la komenco inspiris min, do ankaŭ mi verkis (francelingve) finon. Nun mi esperantigas la tuton.)

Ni enterigis vorton de l' vortaro

Tion diru al la arboj sur la paperplena postfesta plac'.

Tion diru al la kvar direktoj horizontaj.

Tion diru al l'lavendaj tolaĵoj.

Tion diru al l'bovin' en poŝtkarto sur muro de l'kuirejo.

Tion diru al viaj malvestitaj vestoj.

Mi forstrekis vorton de la vortaro,

Kaj mi enterigis ĝin kun adreslibreto mia,

Kun ĝiaj aleoj kaj floroj

Kaj ĉiuj hundoj,

ĉar la kiomo de ĝiaj mortintoj

Fariĝintis pli granda ol ĝi mem.

Estas mortintoj pri kiuj mi fieras,

Sed tio revivigos neniun.

Mi forstrekis vorton el la vortaro,

Tiel, kiel socio forstrekis ĝin el la viv'.

Ni entombigis la flirtintajn lavitaĵojn.

Ili eldetruis la domon, kie niaj koroj sangis.

Oni eŭtanaziis la revojn kun l'intestar' elventrita,

Kaj mortis la vorto tutŝnurligita kaj emfazsonora

Tia, kia olda diplom'

Siajn kurantaj kursivojn kovanta.

Sed, ĝin enterigis mi, amkarese,

Kiel mortintan katon, kiu iam nomiĝis „Rostpano“.

Kaj en lito ampleksa mia mi ankoraŭ revas pri ĝi.

Tion diru al la pluveroj,

Tiu tutŝrumpa mizera vorto

Nomiôis
„*Libero*“.

FILIPE PINTO

« Patrin' mia 'stis cigaredist' »..

Portugala kanto

Patrin' mia 'stis cigaredist',
kiel neniu ŝi konduitis,
plu mi vidas ŝian bildon
en fum' de mia blanka cigared'.

Ŝia anim' blanke pura,
honeste, modesta, rekta,
mian animon envolvis
kiel tabaktubo blankega.

Jam mortinta vivuleto !
Protektu cin l'amo dia,
certe iris ŝi al ĉiel' rekte
volvita en blanka mortotuko.

Patrin' mia, stelo perdita. Mi
plu ŝin vidas de inter veprej',
kvazaŭ ŝi envolvitus en la
mortotuk' de miaj okuloj.

EZRA POUND

La subtegmento

Venu, ni kompatu tiujn, pli bonhavajn ol ni.
Venu, amiko mia, kaj memoru ni,
Ke riculoj havas ĉefservistojn, sed ne amikojn,
Kaj havas ni amikojn, kaj ne ĉefservistojn.
Venu, ni kompatu la geedziĝintajn, kaj la ne
geedziĝintajn.

La tagiĝo venas enen sur piedetoj
Kiel orumborderita baletistino Pavlova
Kaj mi estas apud deziro mia.
Nenion ajn pli bonan havas en si vivo
Ol tiun horon el malombra malvarmeto
La horon vekiĝi kune.

GIL PRESSNITZER

Omaĝo al Luc Bérимont

Poŝtukoj stakitas sur la roboj,
La kuirejo lumigatas de cent jaroj,
La lavtrogo 'stas tro malproksima kaj 'stas frosto
Ĝis fendi la ŝtonojn de memoro.
La kurtenoj pezas sian pezon homan,
La ŝutroj malakordiĝis kun la tilioj eksteraj,
Kunfermiĝas ili en si mem,
Malĝojec' kaŝitas meze bluajn lanaĵojn,
Neniam plu mi eliros el ĉi domo,
Eble tamen por iri al l' puto.
Ŝtoneto en la sitelo.
Jes mi volantas ke da post' ne estu plu.

JACQUES PRÉVERT

Al l'azeno

(eltiraĵo)

Ho grizazeno ! mia amiko, mia similulo, mia frato
Kiel eble dirintus Beaudelaire se
Li estus kiel mi ŝatinta la grizajn azenojn
...

Ĝi estas tie.
Laboristo pigra kuraĝa kaj ĝoja
kaj pli ridigula ol iu ajn
Kaj malgaja kiel la mondo, kiu igas la azeninojn
malgajaj
Kaj tiel noblanima, ke neniam, neniamege, ĉu vi bone
aŭdis gesinjoroj ?
Kaj eĉ se vi ellitiĝos nokte por lin spioni, neniam
Neniamege neniu el inter vi neniam povos fanfaroni pri
Esti vidinta lin rikananta, minacanta,
Humiliganta, triumfanta, surkapigi per homĉapo
La kapojn de siaj infanoj.

Bestoj

Bestoj
nur bestoj ĉiutagaj
kaj ĉiulandaj

Bestoj de l'Tero
kiu nomitus Maro
se nur fiŝo
estus trovinta l'nomon

Bestoj
kiel aĵoj kiuj okazas
kiel aferoj kiuj foriras

Kaj senĉese la sango de l'vivo
elfluas en morton
kaj senforlase floroj de l'amor' revenas
kaj denove bestoj naskiĝas
kaj dumnokte kaj dumtage

Bestoj
kun sia malsat' sia soifo ĝojo mizerego
kaj nu tielsama mistero
tielsama simpleco
kiel ondoj de l'maro arboj de l'ĝangalo

Bestoj
kiel malriĉuloj kun sia senhavo
infanoj kun siaj sekretoj
aŭ virinoj kun sia beleco

Bestoj
kun koro tiel kiel mia aŭ via.
Bestoj kun okuloj kruroj kaj eĉ manoj
kiel tiuj de tiu infano gorilo
sola
ekzilita
en unu inter grandaj simiejoj de l'mondo civiliza.

Bestoj
sen principoj nek edukiteco
kaj
teneraj brutoj nebrutalaj
faŭnanoj ravaj kiel infanrevoj
kiel la kat' kiun katarin' nomas Plumpunet'
kiel la blanka kokin' kiun Minjo nomas Tigrinjo
kiel ŝi nomas sian testudon Doroteo
kiel la leono sur la bildoj
kiun ŝi nomas « la Buglion' »¹⁰
kaj iras vidi en *Kanj'-cê-marô*
kiam alvenas la cirko kun sia rabobestaro
Kaj ŝi diras al li per sia lingvo propra
Kiom forte lin ŝi amas
Kiom ofte al li ŝi pensas

Bestoj
kiel Dragono
trovita hundo hodiaŭ porĉiama perduto
kaj kiu serĉis ĝian lokon subsunan
eĉ dumvintre
sur la sidbenkoj de l'parizaj kafejoj

Bestoj
kiel Medor'¹¹
unu el la katoj kiu loĝis en *Strato Malnova Kolombujo*
en palac' malpura kie ĉiuj interamiĝis
kaj kiu poste vivis en alia kvartal'
tie, kie kuŝas forcej' kun olivujo.

Bestoj
kiel aĵoj foririntaj sed neniam forgesitaj
kiel flugastelo vundo kiso
kiel ridero fonto kanto
kiel folioj surarbaj

10 Nomo de fama cirko.

11 Nomo en Francujo tradicia por hundo.

insuloj subventaj
kiel viroj en stratoj kaj aliaj en karcer'

La mesaĝo

La pordo, kiun iu malfermis,
La pordo, kiun iu refermis,
La seĝo, kien iu sidiĝis,
La kato, kiun iu karesis,
La frukto, kiun iu mordis,
La letero, kiun iu legis,
La seĝo, kiun iu faligis,
La pordo, kiun iu malfermis,
La vojo, kie iu plu kuras,
La arbareto, kiun iu transiras,
La rivero, kien iu sin ĵetas,
La malsanulejo, kie iu mortis.

[Dekoj da homoj faris filmetojn pri tiu poemo ! inkluzive usonanoj,
kiuj lernas la francan, ekzemplo : <https://www.youtube.com/watch?v=nbBxl0Qkhc0>]

Je hazardoj de la birdoj

Tremalfrue mi lernis ami la birdojn,
tion mi bedaŭras,
sed nun ĉio glatiĝis,
ni interkompreniĝis,
ili ne zorgas pri mi,
mi ne zorgas pri ili,
mi ilin rigardas,
mi ilin lasas.

Ĉiuj birdoj klopodas kiel eble plej bone,
ili donas ekzemplon.

Ne ekzemplon, kiel ekzemple Sinjoro Fortreso, kiu tiom rimarkinde kuraĝece kondukis dummilite aŭ ekzemplo de l'malgranda Paŭlo, kiu estis tiom malriĉa kaj tiom bela kaj tiom honesta cetere kaj kiu iĝis poste la granda Paŭlo tiom riĉa kaj tiom maljuna tiom honorinda kaj malbela kaj tiom avara kaj tiom bonfaremula kaj tiom pia. Aŭ ekzemple tiu maljuna servistino, kiu havis vivon kaj morton ekzemplodonajn neniam ioman ajn diskuto ne tiom ! la ungo kiun oni klakigas sur dentoj neniun diskuto kun la Sinjoro aŭ la Signorino pri tiu abomeninda afero de la salajroj.

Ne

La birdoj donas ekzemplon,
la indan ekzemplon,
la ekzemplo de la birdoj,
birdekzemplo,
ekzemplo la plumoj flugiloj flugado de la birdoj,
ekzemplo la nesto vojaĝoj kaj kantoj de la birdoj,
ekzemplo la beleco de la birdoj,
ekzemplo la koro de la birdoj,
lumo de la birdoj.

La pacparolado

Ĉe fino de parolado ege grava
falpuŝiĝante la granda ŝtatulo
je bela malplena frazo
falas enen.

Kaj senkonsila la buŝon malfermega
anhelante
montras la dentojn;
kaj la denta putraĵo de siaj rezonoj pacemaj
nudigas la militan nervon :
la delikatan monaferon.

SULLY PRUDHOMME

(elĉerpaĵo)

Nesto, tio estas intima varmo kaj susur'
Tenero kaj esper' vibre sidantaj enombre,
Diras l'liberan feliĉon, lulatan de l' branĉar',
Feliĉo ja kaŝita, apud al ĉiel' dume.

RAYMOND QUENEAU

La Nokto

Refaldas ĝi kun zorgego la kovrilon,
kiun ĝi sternis ĝis l'kvar finoj horizontaj,
Ĝi ĝin rulas kun malrapid', kaj kun preciz',
Ke aperu l'tuko kaj bluecaj
Eroj malsekigontaj vojojn kaj densejojn.

Jen tiu maljuna virin' kun plenpak' da vestaĉoj,
estas ŝi;
ŝi atendas pri la buso de l' noktoviduloj.
ŝi revenos, ŝi revenos, certas
etendi sur la mond' fortikan kovrilon.

REMY REY

Malpermesita

Ĉu ne estis al vi dirita ?
Tio estas malpermersita !
MAL-PER-ME-SI-TA !
Ĉu komprenis ?

Ĉu vi ne vidis la tabulon
Ĵusmetitan sur la pordon de l'trinkejo ?
Malpermesita !
Ĉu spaniolo ĉu doberman' neniuj hundo
eniru ĉi tie, nek strangulo cetere !
Malpermesitas.

Same kiel monaton majon
Vidu la revenantan peston :
L'antikvan malpermeseraon
Tiu ne estigas gajon,
sed trankviligas la stultulon,
Kiu al vivo preferas karceron.

Ĉu ne estis al vi dirita ?
Tio estas malpermersita !
MAL-PER-ME-SI-TA !
Ĉu komprenis ?

Estu ĝi bone en via cerbo !
Enŝovu tion bone en la kapon !
Malpermesitas !
Ĉu cigar' el ĥavan' ĉu cigaredo
El sentabakec' vi ne havas eskapon
Malpermesitas !

Ilin ĉie montrofenestroj videbligas
Ili eksplodas ĉie kiel batoj
Tiaj tabuloj de l'komenc' etoskreantoj

Vivon mem ili mortigas
malpermesoj tiaj estas insultoj,
survangoj al la pacaj promenantoj.

Bieron gluti el olda trinkilo.
Fumi, revu legi antaŭ radricevilo ...
Malpermesita !
Pro fumi vi mortas, kaj iĝos danĝera pro
pensi. Ajnakoste sekurec' 'stas nepro.
Obeu vi !

Ĉu vi ne vidis la tabulon
ĵusmetitan sur pordon de l'oficejo ?
Malpermesita !
Babiladon taksatas malestimate.
Se diskuti vi volas, ĝin faru strate.
Komprenite ?

Finitas la verva emocio ;
mortintas, entombas, la revolucio.
Mal-per-me-si-ta !
Kvin silaboj honoraj en la okuloj
dorlote flatataj de l'respektataj uloj !
Malpermesita !

Ĉu ne estis al vi dirita ?
Tio estas malpermersita !
MAL-PER-ME-SI-TA !
Ĉu komprenis ?

Ĉio, kio gustas, aŭ bonodoras,
kio verv-kaj-frande vivon honoras :
Malpermesita !
Tre malbonan odoron eligas libero
incitas forte l'malsolidan nazon de l'bonhavularo.
Obeo tuja !

Malpermesitas, enkapigu vi,

nepre malpermesitas malobei
al malpermesoj enleĝigitaj.
Ili estas por via bon' komprenu vi.
Estas por la san' por la sekur' viaj
Neniun momenton forgesu ĉion, kio minacas al vi !

Ĉu ne estis al vi dirita ?
Tio estas malpermersita !
MAL-PER-ME-SI-TA !
Ĉu komprenis ?
Malpermesita !

JOACHIM RINGELNATZ

Am' plej mallonga

Mallertaj kampuloj, kiuj la bonulan
Saluton de l'burĝoj ne reciprokas,
Homoj, kiuj per duona kapsigno dankas
Sen nur levi la okulojn.
Prudaj, timemaj virinoj, silentaj
Geknaboj, dignaj olduloj –

Sed, kiam preter vilaĝ' aŭ kamp'
Aŭ arbar' muĝas cia trajn',
Ci el la vagon' rigardas :

Jes tiam staras – staras tiuj ankaŭ
tute al ci kontraŭ,
Sur dekliv', ĉe pordeg' de l'stal', en l'herbejo.
Kaj salutas ili, grandgeste salutas
Kaj ade.

Plenformajn salutojn liberajn
Je ci kaj ciaj samveturantoj.

Kaj
La plej pura am' elfluas
For

Du formikoj

(Esperantista parafrazo)

En Rotterdam' Nieuw' Binnenweg, n° ses
Tie loĝis du formikoj, Unu fojon
Ili planis forvojaĝi Aŭstralion.
Alvenintaj ĉe l' n° cent sepdek-ses
La kruroj ekdoloris, ili do kun saĝ'
Reznis pri la dua parto de l'vojaĝ'.

Nu tio al ni okazis

(pri Germanio 1933)

Nu tio al ni okazis.
Tion ne forgesu kiam tempoj boniĝos !-
Sed kantas la birdar' kaj kantis,
Kaj estu senlime vasta via kor'.

Tion ne forgesu ! Nur por lerni
Pri tiu enigmo stranga : „sorto“. –
Kial povas oni ju pli for la staro,
Des pli amplekse vidi ?

Morto fiere paradmarŝas.
Tamen morti estas tempoperdo. –
En la brusto al vi estas koro,
Ĝin perdi vi ne rajtas.

La poŝtmarko

Ion belan poŝtmarko virgenra
Spertis antaŭ kuŝo surletera :
Li estis de princino lekata.
Do estis en li la am' vekata.

Ŝin ree kisi li deziradis,
Sed forvojaĝi oni lin trudis,
Tial li amis ja sen efiko.
Tio estas de la viv' tragiko.

Poemo en zi-lingvo

Ho Luci'
Mizi cizin azimazis
Tiziozim. Kazij ĉuzi
Reziciziprozikazis?
Nezi. Pazirdozinuzi.

Azipuzid aŭzi nezi
Bezinuzi cizin Dizi'
Cizin mizi bozinezi
Ŝazitazis rezivizi.

Straßenbahn 23 kaj 13

Tio nur en Frankfurto okazas :
Ĉehalte veturis la tramo subĉielan trakon,
Ĉe l'vojo vidis ĝi helikon,
Kaj diris, oscedante: « Envagoniĝu ja, se al vi plezuras. »

Rifuzis la heliko : „Dankon, urĝas al mi.“
Do tiam la tram' ekiro-signalon aŭdigis, kaj ankoraŭ unu,
poste trian, kaj kvaran pli.

Kaj, porvere, pgrade, ree pluveturi ekkomenciĝis,
Por ankoraŭ antaŭ dimanĉo ĝisatingi la postan stacion.
Tie vidis ĝi el tri cent kadavroj vicon,
Haltintaj homoj, kiuj atendantaj malsatmortiĝis.

RANDA SABRY

El taglibro de juna Irakanino

lundo 24-a de marto 2003...

Per kolor' de Bagdad' plenu la okuloj
Antaŭ ol ŝirati sub obusopluvoj !
Per ĝiaj parfumoj plenigas mi l'nazon,
Antaŭ ol strat' nia plenos je veneno,
Per muzik' Bagdada mian korpon lulos
Kaj karesas l'udon kiu baldaŭ mutos,
Pretigas kuraĝon por kriegojn aŭdi
Histeriajn kuglojn kaj en nokto fali.

Planitas mort' mia. Al mia patrujo:
Ekstaza poemo en ĉiu palmejo,
Celas ruinigo sub nomo « Libero ».
Planitas mort' mia kune kun miloj da.
Amemajn la brakojn revantajn brakumi
Al vivofeliĉo, ili igos premi
Je brulintaj korpoj, katastrofpulvoro.

Ili gravaj homoj ordonis min morti,
Jam asertis la buŝ', matamora brusto
Mensoga ĝendarmo pavas, ĉar scias li :
Estas liaj klaĉoj pravo de l'batanto,
Lia sangsoifo, lia lupmalsato
Kontentiĝos, ĉe la posta matenruĝo.

El oraj salonoj, ili jam aplaŭdas
Al urboj ĥaosaj, dum mi la mortonta
Pretigas kuraĝon je sufer' nehoma,
Amatajn vizaĝojn arde rigardadas...

DOMINIQUE SAMPIERO

Rezigninte je ĉio krom ĉeesto

Plaĉas min l'grizar' de l'maten' kaj ties silent'.
Similas je lacega kamparan', sed bela de lia
ellaciĝo. Kvieta. Senkolera iu sen
povo. Rezigninte je ĉio krom ĉeesto.
Maten' 'stas antaŭ mi tiel, kiel tag-
fino. Ne tristas, min similas kaj
ĉiujn homojn kies frunt' al ĉiel' tuŝas.

CARL SANDBURG

Perla nebulo

Malfermu nun la pordon.
Jen rulu supren la kolumon
De via palto
Por paŝi en la varieman nebulan skarpon.
Eldiru nun viajn pekojn
Al la perla nebulo.
Kaj nun konu nokton profundigantan
Strangan kiel duonsencoj kaŝigintaj
En de sagaca virino musecaj okuloj.
Jes diru viajn pekojn.
Kaj eksciu kiom senzorga perla nebul' estas
pri la de vi malobservitaj leĝoj.

SENNOMA 1

(ampoemo antikva Egipto — el franca traduko)

Mi estas via unua fratino, kaj vi estas al mi la ĝardeno, kiun mi priplantis per floroj kaj aromaj herboj.

Mi direktis tiuĝardenen kanalon, ke vi povos en ĝi mergi viajn manojn, kiam leviĝos la malvarma vento, kiu blovas el nordo.

Kiom bela loko estas tiu-ĉi, kie ni promenas, kiam via mano premas mian, kaj ni havas la menson pensema kaj la koron ĝoja tial, ke ni estas kune.

Aŭdad' de via voĉ' ebrigas min, kaj mia tuta vivo kuŝas en la ĝojo aŭskulti vin. Vidi vin al mi pli valoras ol trinki kaj manĝi.

Kiam mi vidas vin, mi vidas lumon. Mi premigas min al vi, ĉar vian amon mi konas, ho vi la viro je kiu mi sopiras.

Kian agrablan horon mi pasigas ! Ke eble ĝi fariĝu eterno tiam, kiam mi dormas apud vi. Vi plenigis mian koron. Mi faras tion, kion vi deziras de mi, kiam mi estas inter viaj brakoj.

Mi estas via unua fratino.

Mi estas por vi kiel ĝardeno, kiun mi priplantis pere de floroj kaj aromaj herboj.

Agrabla estas la aleo kiun via mano fosis dum malvarmeto de la norda vento.

Kiam mi vidas vin mi bezonas nek trinki nek manĝi.

SENNOMA 2

(esperantigita el du tradukoj francen kaj anglen de Yu Shibo)
Mongola popolkanto

Eble fato volas, ke geamantoj sin renkontas nur en certaj momentoj kaj en certaj lokoj.

Malgraŭ, ke mi ne povis konatiĝi kun vi pli antaŭe, kion mi tre bedaŭras, tre aprezas mi, ke Dio favoris al ni, ke ni renkontis unu la alian.

Post tiu maldaŭra kunesto, ni dum longa tempo ne vidos nin, sed en la korfundo mi gardas por vi benon, zorgeman kaj dolĉan pensadon pri vi, kiu estas je mil lioj for.

Eble la destino volas, ke oni estu disigita de plej mirindaj aferoj de la vivo, sed jam estas feliĉo, ke oni povas frandi etan manplenon da ili.

Se tio estus refarota mi dirus, tio estas eraro renkonti nin.

Kaj laŭlonge de la jaroj pasio velkis iom post iom, kaj mi malkutimiĝis flegi revojn graciajn per la rimedo de nuraj vortoj.

Dum via foresto mi ne plu povas trompi min per iluzioj : nia estas nur ordinara amo.

Eĉ se oni povas aperigi ĝin kiel sanktan vestante ĝin per beligaj kaj pompaj vortoj, tio povas nur aperigi sur la vizaĝo ian serenon rideton, sen tamen konsoli la dolorojn kaj sekretajn malĝojojn plej funde de la koro.

Vi kaj mi vivadas en malsamaj landoj, parolante eĉ malsamajn lingvojn, havante ĉiu apartan estontecon, kaj havos eĉ neniam okazon renkontiĝi.

Tamen ni povas dum la daŭro de tuta tempo zorgi unu pri la alia kaj doni kuraĝon unu al la alia, kiel animamikoj por la tuta vivo kaj granda trezoro en nia memoro.

SENNOMA 3

(angla popolkanto)

Geknaboj eliru ek ! La lun' brilegos ĉi nokte kun hel' ;
Lasu viandon kaj kukon, kaj ludu kolege en la strat'.

SHEL SILVERSTEIN

La knabeto kaj la maljunulo

Diris la knabeto, « Foje min eskapas mia kulero »
Diris la maljunulo, « Al mi tio okazas ankaŭ »
La knabeto honte flustris, « mi malsekigas mian kuloton »
« Ankaŭ mi faras tion » ekridis la maljunulo.
Diris la knabeto, « mi ploras ofte. »
L'maljunulo kapklinis dirante,
« Ankaŭ mi. »
« Sed la plej malbona, » diris la knabeto, « ŝajnas »
ke plenkreskuloj pri mi ne atentis. »
Kaj li sentis varmon de faltita mano premi lian.
« Mi konas, » diris la maljunulo'.

JULES SUPERVIELLE

Alvoko al nokto

(elĉerpaĵoj)

Tago ĉiam grimpas al suprenda dekliv',
Vi faladas en ni, kun neniam finviv',

...

Vi logas nin, al profundec' kultivas nin.
Morto vi ne estas, sed en mallum' atend'.
Nigrec' vi ne estas : steloj kompasas vin.

Homa, fratino nia, flua, ĉirkaŭa.

...

Ĝi alpafas nin per rokoj el silent'. Kaj
Subite ni plivastigataj, kavigitaj per demandoj,
lom ŝanceliĝaj, ĉiam revebriaĵ,

...

Kiel ni en malhel' glimas, kiel esperon flegas
Ni finveni al l'vasta kor' forkaŝa kie nigras.

...

Ni ĉiam aŭdas en malproksim' petegon
Provantan limigi senfundan angoron.

...

Atendo morton

Pajlobarako en Paragvajo
Kie mi atendus en hamako
Tiun, kiu scipovas veni mem.

La kapon enigus griza bovo
Kaj kontraŭ mi ade li remaĉus
Plenan tempon lin vidi mi povus

Hundo enirus soifeganta, kaj
Ĝis mia akvopoto alkurus
El ĝi trinkus, kaj trinkus, kaj trinkus,

Kaj fine rigardus al mi,
El la langruĝo vidus mi
Akvogutojn fali al ter'

Birdoj antaŭ l'pord' tranĉus
Tra taglum' dum viglaflug'
Kaj neniun hom', neniun !

Mi mem malĉeestemos.

Inrevenfantomo

La korvoj disŝiris per bekoj al nuboj
Forporte ŝirpecojn,
Forsinkige l' anĝelarajn ŝipanarojn,
Variaj ĉi-ŝipoj.

Homvoĉaj vircervoj plenigis montarojn
Tiom esprimvoĉe
Ke per blankaj rozoj pleniĝis l' abioj
Kaj falis surflanke.

Ho ĵuru, ĵuru mem, mortintino zorga
Je memoroj plena
Ke ne vi estis ĉi gvatanto ĉeranda
De l' eksa viv' via.

Ke l' travundo de fin' al fin' transpikinta
Malfacilan nokton
Ne via estis, la ĝismatengvatinta
En roso animon.

Vi afablu al poeto!

Vi afablu al poeto!
Ĉar li estas milda besto,
koron, cerbon al ni pruntas,
Niajn plagojn li proprigas,
lgas sin nia ĝemelo.
En dezertoj de l'a-vortoj
Iras li antaŭ profetoj
Sur sia suferkamelo.
Li honestul' vizitadas
Mizeron kaj por ni bonas,
Oferante, bona bruto,
Sian korpon al vulturo;
Kondukas al klarverkaĵojn
Niajn palajn ek-svagaĵojn
Al li donu festdonacon :
Interpretistan kaskedon !

WISŁAWA SZYMBORSKA

(esperantigita el la franca traduko)

Laŭdo al malbona konscienco

Cirkuo havas nenian kaŭzon por memriproĉo,
Skrupuloj estas fremdaj al pantero,
Piranjoj neniam pridubas siajn agojn,
La krotalo aprobas sin senrezerve.

Neniu iam ajn vidis ŝakalon pripentintan.
Lokusto, aligatorio, trikinelo kaj tabano
Bone vivas, kiel vivas, kaj pri tio tre kontentas.

La koro de granda orcino pezas almenaŭ cent kilogramojn,
Sed alirilate ĝi tute ne sentas al si pezan koron.

Kio estas pli besta
Ol trankvila konscienco
Sur la tria planedo de l'suno ?

*(Brila poemo, sed la „plej belaj rakontoj pri hundoj“ de Elian-J.
Finbert montras, ke hundoj povas ja senti kulpecon, eĉ puni sin
mem, eĉ memmortigi sin pro rimorso, kaj esploroj de Frans De
Waal montris la unuajn ŝtupojn de moralo ĉe ĉimpanzoj)¹²*

12 Vidu Elian-J. Finbert : ... kaj Berto Breĥto :

ŜAHRZAD IRANI

*(originalo anglalingva verkita en ekzilo, la urbo Abadano estis
detruita dum la milito Irano-Irako)*

Kio estas amo per alia nomo

Ĉu vi jam aŭdis pri la perdita urbo
Atlantido ?
Rakontoj estas rakontataj
Pri ties civilizo ;
Multaj esploris pri
Ĝia lokiĝo, oferante sumegojn,
Ankaŭ vivojn;
Legendoj inspiris scivolemeon kaj fascinon.

Kiel eblas ke urbo estas forgesita ?
Kio okazis je ĝia popolo kaj kulturo?

Se eltrovitan ĉu vi scivolus ĝin ekkoni,
Iliajn vivojn imagi ?

Ĉu floroj ankoraŭfoje kreskus ?
Ĉu grundo denove fluigus
En ĉiujn angiojn de l'floroj tiun vivon legendan?
Ĉu ĝardenoj parfumus en la aer'?

Ĉu la palmoj la sekretojn de ĝiaj loĝantoj dirus :
Iliajn dezirojn, afliktojn, esperojn, revojn
La ruĝiĝintan ridon de junulino, kiu
Ĵus unuafoje sentis kareson de l'suno ;
Knabon kuranta por iĝi viron, dum la urbo lin akceptas
Kaj ade dorlotas ;
Renkontojn sekretajn kaj promesojn.

Mia kapo inundatas je aromo de Atlantido,
Trankvila mi ne plu povas resti.
Mia konfeso iradis tra jaroj multaj

Tra landoj multaj, antaŭ ol atingi vin,
Pardonu pri min ne malkaŝi,
Mi petas : aŭskultu mian koron.

Mi naskiĝis en Atlantido.
Ĝian lakton mi trinkis, kaj miajn muskolojn
Atlantio nutris, kaj menson mian;
Ĝia suno estis mia ŝirmo, kaj ĝiaj muroj mia parfumo,
Ĉiuj ĝiaj loĝantoj estis najbaroj miaj.

Atlantio vartis min nokte, kaj ĝia tagmezo
Miajn revojn prilumis;
Atlantio promesis al mi amon, pasion, aventuron;
Atlantio al mi lernis, kiel daŭre braĝigi la civiton en mi.

Mi nun kapablas lumigi la urbon laŭ mia volo.
Daŭre mi sentas la varmon de la najbararo.
Ĝian ritmon aŭdas mi, kaj mi movas laŭ ĝi.

Nokte, mi povus ferminte la okulojn piediri la stratojn
Dum horoj .
Mi ripozas riverborde, kaj igas la oran akvon
Mildigi miajn plandojn.

Mi min demandas, kiom da homoj
Memoros tiun landon!

Tiun urbon mi amas tutforte, ĝiajn kolorojn kaj
Bravajn civitanojn, sentemajn kaj ĝojemajn kanzonojn, bonkorajn
Kaj saĝajn intruistojn, kaj ĝiajn gvardistoj kaj militistojn.
Foje timas mi, ke mi povus forgesi Atlantidon;
Tiam mi kuras tra la stratoj, la paŝtejoj.
Mi tie trovas la plej egan, plej verdan palmon, kaj
Ripozas sub ĝia belo, sekretoj ree estas re-dirataj
Denove memoras mi.

Mia koro suferas pro la homoj, kiuj
Neniam envivis, neniam konis Atlantion.

Neniam sentis la varmon de ĝiaj stratoj, Molan
Nigran sablaĵon, balzamajn ventetojn, ĉirkaŭpremon
De ĝia rivero. Kaj amantojn, kiuj neniam timis
Kaj ĉiam kredis.

Mi scias, ke neniam Atlantido estos denove.
Ŝajnas, kvazaŭ la dioj kreis
La plej mirindan lokon surteran por
Lasi la infanojn libere kuri,
Fondi sanktejon por la geamantoj,
Certigi, ke ĉiuj loĝantoj havu amon en iliaj koroj,
Konduki febran printempon, eternan someron, sencedan sunon
Kune pruvi,
Ke Paradizon posedas la vivantoj.

Tiu renkonto de tempo, vivo, amo elfaris frukton, kiu
Neniam povus dufoje fariĝi.
Aliaj eble simile odoros. Aŭ aspektos
Sed neniam estos la sama travivo .
La recepton vi povus peti al la dioj kaj ajne
Klopodi, neniam la sama estos.

Do fato mia estas ĝin memori kaj kun ĝi vivi nur
En koro, sciante , ke neniam plu estos am'
Kondamnite je kunporti tiun sekreton en mi.

Nun kaj nun mi sopiras prihejme kaj bezonas paroli pri
Mia urbo.

Do se vi min vidas malgaja, demandu min pri mia nasgiĝloko.
Kaj ĉar pri Atlantido mi ne povas paroli
Demandu de mi alian nomon ĝian.

Demandu al mi pri Abadano.

RABINDRANATH TAGORE

(realnome Rabindranath Thakur; bengale রবীন্দ্রনাথ

ঠাকুর)

(poemoj esperantigitaj el la franca traduko)

« Poema oferdono » - poemo n° 60

Sur la plaĝoj de la mondoj senfinaj infanoj kuniĝas.
Super ili senlima senmovas blua ĉiel', apud ili la senhaltaj ondoj
bruadas.
Sur marbordoj de la mondoj senfinaj infanoj kuniĝas kun dancoj kaj
krioj.

Siajn domojn ili konstruas el sablo, ludas per konkoj malplenaj. Per
folioj velkintaj ili garnas siajn ŝipojn kaj kun rideto lanĉas ilin sur la
maron senfundan. La infanoj plenumas siajn ludojn sur la plaĝoj de
la mondoj.

Ili ne scipovas naĝi, ili ne scipovas fiŝkapti. La perllokolektistoj
ekprofundiĝas, la negocistoj ekvelas ; la infanoj dume kunigas
rulŝtonojn, kaj poste ilin disigas. Ili ne serĉas kaŝitajn trezorojn, ili
ne scipovas fiŝkapti.

La fluso venas kun rido kaj la plaĝo, pala helo, ridetas. La ondoj
mortoplenaj kantas al la infanoj necertajn baladojn, kiel patrino al la
bebo. La fluso ludas kun la infanoj kaj la plaĝo, pala helo, ridetas.

Sur la plaĝoj de la mondoj senfinaj infanoj kuniĝas. La ŝtormoj
vagas tra la ĉiel' sen vojoj, la ŝipoj pereas en la maro sen trako,
morto gvas kaj l'infanoj ludas. Sur la plaĝoj de la mondoj senfinaj
okazas la granda kuniĝo de la infanoj.

« Poema oferdono » - poemo n° 74

La taglumo pasis, ombro sur la tero. Jam temp' estas, ke mi iru al
l'rivero, por kruĉon plenigi.

La aer' maltrankvilas per akvomurmuro, kiu al mi alvokas. Tien en
la vesperon mornan iros mi. Neniu sur la soleca pad' ; ekventas ;
kaj ektemas l'iversurfac'.

Mi ne scias ĉu reveno, 'stos eble hazarda renkonto... Tie apud
l'travadejo en mallarĝa barko nekonata viro liuton ludas.

Kanto de l'malvenko

(ĉi poemo de hinduo rimarkinde renkontiĝas kun la plej kristana sento)

Min ordonis Mastro, dum rande de l'vojo sidas mi, kanti kanton de l'Malvenko, ĉar la fianĉino estas tiu ĉi, kiun Li kaŝe amindumas.

Nigran vualon surmetis ŝi por l'vizaĝon kaŝi je l'popolamas', sed juvel' sur la brust' en nokto briladas.

De l'tago ŝi forlasitas, sed nokto de Dio ŝin atendas, kun ĝiaj lumigitaj lampoj kaj rosperlumitaj floroj.

Silentas ŝi, kaj malsuprenokulas ; domon sian ŝi forlasis malantaŭ si, kaj el tiu domo eliĝis sur vento veo.

Sed ĉiuj steloj kantas kanton de amo eterna al tiu milda vizaĝ' je honto kaj sufer' plena.

Malfermitas la pordo al la soleca ĉambro ; sonoris la alvoko, kaj koro de l'nokto tremegis per soleno, pro l'venonta elprovo.

Nokto

Nokto ! vualita nokto!
Estu mi via poeto !

Kelkaj staris mute en ombro via dum jarcentoj,
Ho lasu, ke per mi rivelatus iliaj kantoj.
Sur vetur' via sen rad' silente
Kunprenu min mond'-al-mondo migrante.
En tempopalac' vi reĝin'
Raveglora kaj senlumin'.

Multe da demandsopira spirit' kaŝe
En vian korton enŝteliĝis silente,
Tra senluma domo via esplorante
Respondon petante vagis paŝpostpaŝe.

.....

Estigu min, nokto ! ilian poeton ;
Mi poetu vian senfundan silenton.

JEAN TARDIEU

La deca mond-civitano

Docentmaniere, precize, sekvoĉe, sed akordiĝeme

Tiun mondon logike ŝatas mi
Pro tiuj veroj, kiuj pravigas
Menskapablojn, kiuj konsistigas
La komprenecon enkaŭ de ni.

Ekzemplo : mi ŝatas ĉi spacon
En kiu la mondoj lokiĝas,
Objektoj kaj etaj kaj egaj,
Kaj ankaŭ mi amas disvolvon
De l' tempoj sinsekvaj en kiuj
Ĉi tiuj objektoj moviĝas,
Ĵus kiam fuĝante l' nenion
Nur danke al la form' kaj kolor'
Ili al vidanto videblas :
Verdaĵo ĉar vere ĝi verdas
Ruĝvino, ĉar nepre ĝi ruĝas,
Ĉielo, ĉar blue ĝi bluas
La likvoj ĉar ili fluidas,
Kontraste la stato senmova
Tre strange ecigas solidojn
Starantaj en staro senŝanĝa.

Nu, se en tiu mondo logika
La aferoj alimaniere,
Neniom malpli mi kontentiĝus.
Jes la movojn ĉiajn mi tre ŝatus,
Ĉar nenio tiam ŝanĝas lokon,
Kaj de spaco kaj de tempo ordon,
Ĉar nenio iras propran vojon,
Dum migrado okazanta antaŭ
Ol eliri la neekzistadon,
Kaj la aĵojn kiuj ŝanĝas ankaŭ

Kaj koloron kaj konduton.
Ruĝan vinon ĉar ĝi blankas,
La ĉielon, ĉar ĝi ruĝas,
Blankan neĝon, ĉar ĝi verdas,
La herbejojn, kiuj nigras,
La fiksaĵojn, moviĝantajn,
Kaj la solidajn fluaĵojn.

Mi ne postulemas, kiel eca
Ĉiu afero estus, kontentas
Mi, ja obeema civitano
En ĉi universo konsekvenca.

Ni hipotezu la problemon solvita
aŭ La filozofia ruzaĵo

De la dimanĉo al sabat'
La tagojn, sezonojn, vivon,
Morton, la plenan fatrason,
Mi kredis, ke mi komprenas !

Nu, ne gravas se veras ne,
Ĉar se ni estas tro stultaj
Ni ŝajnigu ke ni komprenis
Por timigi al la spaco :

Eble estas ĝi kiel ni
Beste konsternita
Per steloj palpebrumante
Kvazaŭ ĝi komprenis

Pronomstudajo

Ho vi ho vi ho vi ho vi
Vi, kiu jam, kaj vi tamen.
Vi, kiu ĉefe.

Vi, kiu dum, vi, kiu iam, vi, kiun ĉiam.
Vi nuntempe.

Mi ĉiam arbo vi ĉiam herbej'.
Mi vento, vi foliar'.
Mi inter, vi laŭ !

Kaj ni, kiuj sen iu ajn,
Ĉe la helo, ĉe l'silento
Kun nenio, por ni sole,
Ĉio plene ĉio !

Solipsismo

(kun akĉento popolo pariza. Pasio kaj certo
agresemaj. Kun gestoj)

Kiu do ĉeestas, he !
kiam mi ne 'stas tie ?

Ĉu 'stas l'skribotablo ?
Ĉu la pordo ?
Ĉu l'pargeto ?
Ĉu l'plafono ?
Ĉu eble l'strato ?
Ĉu la tero ?
Ĉu la ĉiel' ?
Ha diable !

Kiam mi ne ĉeestas
Neniu estas.
Pruvo ? 'stas, ke kiam mi revenas
Mi kunportas ĉion reen
Kaj jen la ter'
Kaj jen l'ĉiel'
Kaj jen la strat'
Kaj mia dom'
kaj jen la pord'
Kaj l'pargeto
Kaj jen l'plafon' !

ERIC TELLENNE

Recitaĵo

La lun' kaj l' Sablovendist'
Sekrete geedziĝis
Kaj fidon gepromesis
En acerarbaro nokte.
Araba estis la lun'
Kaj germana la vendist'
Do du dignaj maljunuloj
Oficis por tradukoj
La luno venis nuda
Kiom bela, bela, belas!
Kaj etpaŝe ĝi dumdancas
Abrotanon odorante.
L' vendist' en ruĝa mantel'
Ridas en barbo el fer'.
Vidigas per mangesto
Bildojn el Ĉiel' kaj Infer'.
Post meso estis balo
Kaj por ĉiu hejmraveno
Tra silka spaco kaŝe
Sur susurobtuza ŝose'

PAUL-JEAN TOULET

En Arles¹³ kie 'stas Aliskampoj¹⁴

En *Arles** kie 'stas *Aliskampoj***
Ombro ruĝas sub la rozoj
Kaj klaras tag'.
Singardu pro la tempodolĉ'
Se vi sentos bati sen kaŭz'
Via peza kor',
Kaj mutiĝos la kolomboj.
Nelaŭte flustru se pri amo
Apud tomboj.

13 Provenca urbo, pronuncu *arl'*, laŭ PIV : *Arlezo*.

14 Antikva tombejo el la romiaj tempoj

<http://www.christianvancautotems.org/article-dans-arles-ou-sont-les-alyscamps-38050242.html>

BERNARD DE VENTADOUR

Sudfranca trobadoro de la 12-a jarcento p. K., kiu verkis en la okcitana lingvo. Lia okcitana nomo estas Bernart de Ventadorn, dum Bernard de Ventadour estas lia francigita nomformo.

“vidanta mi l’alaŭdon svingi ...”

Vidanta mi l’alaŭdon svingi
Pro ĝoj’ l’flugilojn kontraŭ suna radi’,
Ke ĝi sin forgesas, kaj faliĝas
Pro l’dolĉo, kiu en la kor’ venis:
Ve! tioman envion flegas mi
Pri ĉiuj ĝuantoj vidintaj de mi !
Mirigas min, ke el deziro
La kor’ al mi ne fandiĝas.

EMILE VERHAEREN

Vento novembra

Sur erikej' senfine longa jen
Vento kornante pri novembr'
Sur erikej jen senfine
Jenas la vent' !
Ke ŝiras sin, pecigas sin,
Per peza spir' batas urbojn
Jenas la vent' !
Sovaĝa vent novembra !

Ĉe l'putoj farmbienaj
La feraj siteloj kaj pulioj
Knaras,
Ĉe l'cisternoj farmbienaj
Siteloj, pulioj
knaras kaj krias,
Tutan morton diras ties tristo.

Balaas vento laŭ l'bordon
La betulfolian verdon
Sovaĝa vent novembra,
L'Vento mordas inter branĉoj
Al birdnestoj,
L'Vento feron skrapas
Kaj lavangojn fore kombas
De Vintro l'maljuna, furiozas
Furioze la vent',
La sovaĝa vent' novembra.

Koroj kompatindaj

Tiel estas koroj kompatindaj,
Kaj en ili el plor' lagoj,
Kiuj palas kiel ŝtonoj
Entombejaj.

Tiel estas dorsoj kompatindaj
Pli pro sufer' kaj ŝarĝ' sinkaj
Ol l'tegment' de l'domaĉ' bruna
Interduna.

Tiel estas manoj kompatindaj,
Kiel surŝosea foli',
El la flavaj kaj velkintaj
Antaŭpordaj.

Kaj okuloj estas kompatindaj,
humil'-, bonec'-, zorgo-plenaj
Kaj pli tristaj ol best-rigard'
Sub la venteg'.

Tiel estas homoj kompatindaj,
Kun indulgaj gestoj lacaj,
De mizer' krueladitaj,
Tra la ebenaĵoj teraj.

Arboj sanktuloj mortintoj ventoj

Krucegojn desegnas vojoj
Ĝissenfine tra arbaroj ;
Krucegojn desegnas vojoj fore
Tra ebenaĵoj senfine ;
Krucegojn desegnas vojoj
En frosta palega spac',
Kie taŭze eĥas venta paŝ'
Ĝissenfine aleoj tra.

Arboj, ventoj, similaj je pilgrimoj,
Tristfrenezaj arboj, kiujn kroĉas venteg',
Similaj l'vicaron de ĉiuj sanktuloj,
Vicaron de l'mortintoj
Dum sonorilbat'.
Vi militistoj kontraŭnordaj
Arboj, kaj ventoj ŝirantaj.
Ho luktoj, plor', konscienciproĉ' viaj
Barakte sturmas profundece en animoj.

Jen Novembro, ĝi ĉe forno sidas;
Malgrasaj fingroj varmigantaj sin
Ho ! tiomaj mortintoj sen
Fajr', tiomaj ventoj kontraŭ mur' puŝas.
Repuŝitaj foĵetitaj
Al nekonat' de ĉia flank'.

Tiuj sanktulnomoj, ho litaniitaj !
Ho ! la arboj jene,
Unutonaj nomoj ho memorigitaj !
Dum preĝ' sen fin' viciĝante.
Tiuj brakoj petegante,
Tiuj branĉoj al horizont' strebe,
Sen help' al kia Krist', kiu pendas kie?

Jen grizmantele Novembro side,
Kuntiras sin ĉe l'kameni time,
Kaj ek la okulojn levas

Al trans frakasitaj vitroj ventoj,
Arboj konvulsiantaj sensange
Tra l'sen fin' spaco mortpala strange.

Arboj, ventoj, sanktuloj, mortintoj,
Diru kiel tiuj mense kunfandiĝas !
Kiam base frapas
Sonorilege frapiloj,
Alĉiele funebrantas
El krivomantaj la turoj.

Jen Novembro, ĉe l' forno lumigas
La lumilon kun esper'
Bruligontan da vesperoj kiom ?
Petegas Novembro plorhumile tiom,
Por kortuŝi l'meĥanikan koron de l'hor'!

Sed ekstere jen ĉiame ferkolore ĉiel'
Kaj sanktuloj, kaj mortintoj
Kaj profunda la irantar'
El kirlbranĉaj frenezarboj
Senforlase trairanta tra la kampar'.
Kiaj krucoj jen la vojoj
Ĝissenfine tra la landoj
Jen vojegoj kiaj krucoj fore
Ĝissenfine kaj tra valoj, kaj arbaroj.

PAUL VERLAINE

Maldiligentaj

(en « Galantaj festoj »)

« Nu ! kvankam destino ĵaluzas,
Ni mortu kune se vi volas !
- Nekutimas la propono !

- Nekutimo estas bono
Kiel en Dekamerono.
- Hi ! hi ! hi ! la stranga amanto !

- Stranga, mi ne scias, amanto
Certas. Kaj pleja pravanto.
Nu ni mortu en ĉi horo ?

- Pli bone vi ŝercas Sinjoro
Ol vi amas, kiel oro !
Sed ni silentu en sereno. »

Tial Tirso kaj Dorimeno,
Side en silka domeno,
Ĉe faŭnoj sursokle ridantaj

Kulpis la nepardoneblantaj
Prokrasti mortojn la estontajn.
Hi ! hi ! hi ! la strangaj amantoj !

Obtuze

(en « Galantaj festoj »)

Kvietaj en duonlum'
Fare de l'altaj branĉoj
Ni mergu nian amon
En la silentan profundon.

Fandu animojn, korojn,
Sensojn elektaze,
En langvorecajn svagojn
Pin- kaj arbutujmeze.

Duonfermu l'okulojn,
Brusten kunigu l'brakojn,
Kaj for la kor' mutiĝe
Por ĉiam ĉian celon pelu.

Agordiĝu lasavole
Ni je l'lula spir' vente
Sulkumanta ĉe via
Kruŝ' rufon razenonde.

Kaj, kiam, en solen', vesper'
Falos el nigraj la kverkoj,
Voĉo de nia malesper'
Najtingalo jen kantos.

ALFRED DE VIGNY

(eltiraĵo)

Aŭdi al rediroj, kiom, kiom mildas !
Rediroj de l'pasinto-fund'.
Dum arbobranĉoj nigras,
Dum neĝ' dika sonĝas sur la frostinta grund',
Dum poplo solas sur pala ĉiela fon',
Dum sub la ŝal' blanka ĵus ĝin kaŝinĝinta
Senmove korvo sin lulas sur arba kron'
Kiel ventoflago sur tur' pintiĝinta.
Aŭdi al rediroj, kiom, kiom mildas !
Rediroj de l'pasinto-fund'.
Dum arbobranĉoj nigras,
Dum neĝ' dika sonĝas sur la frostinta grund'.

WALT WHITMAN

Kiam mi aŭdis la kleran astronomiiston

Kiam
mi aŭdis la kleran astronomiiston;
Kiam la pruvoj, la figuroj estis ordigitaj kolumnvice antaŭ miaj
okuloj ;
Kiam mi 'stis montrita la mapojn, la diagramojn, kaj kiel sumi, dividi,
mezuri ilin ;
Kiam mi sidante aŭdis la kleran astronomiiston multaplaŭdite
prelegantan en la prelegsalono,
Kiom baldaŭ senkialul' iĝis mi laca, kaj malbonfartis ;
Ĝis ekstarinte ŝtelforiris mi, kaj vagis tutsole,
En mistika la malseka noktaero, kaj fojfoje
Supren alrigardis silentege al steloj.

Senbruan Pacienca Araneon

SENB RUAN, pacienca araneon,
Rimarkis mi, sur eta elstarejo kie, ĝi staris, izole;
Rimarkis kiel por esplori vakan vastan la ĉirkaŭon,
Ĝi lanĉadis fadeneton, fadeneton, fadeneton, el si ;
Ade ilin malbobenante – Ade ilin senlace ekspedante.

Kaj vi, animo mia, kie staras,
Vi, ĉirkaŭita, ĉirkaŭita, de senfinaj maregoj da spac',
Senĉese enpensinte, ekprovante, alĵetante, la sferojn alserĉante
cele ilin konektigi ;
Ĝis la pont' al vi bezonota formitos – ĝis serviva l'ankro tenos;
Ĝis la de vi svingita gazfaden', ie trafos, animo mia.

CHANDRA WICKRAMASINGHE

(Srilankdevena sciencisto - haikuo verkita angle kiam adolesko)

Sub svarmo da steloj staras mi plaĝe.
Kaj min mi demandas sola,
kiom da viv' kaj am' estas ĉinokte ?

La Flago

(franco, prozpoemo verkita en 1924 pri la unua mondmilito)

Ili estas mil kvincent miloj mortintaj pro tiu aĉaĵo.
Mil kvincent da miloj en mia lando, dekkvin milionoj en la landaro.

Mil kvincent miloj da mortoj, Dio !

Mil kvincent miloj da mortintaj viroj por tiu trikolora
putraĵo ...

Mil kvincent miloj, el kiuj ĉiu havis unu patrinon, unu
amantinon,

Infanojn, domon, vivon, esperon, koron ...

Kio estas tiu ŝtofaĉo por kiu ili mortis ?

Mil kvincent miloj, Dio !

Mil kvincent miloj da mortintoj por tiu ĉi aĉaĵo.

Mil kvincent milo elventritaj, dispecigitaj

Neniigitaj en la sterko de iu batalkampo,

Mil kvincent miloj, kiuj NENIAM plu aŭdos,

Kiujn iliaj amantoj revidos NENIAM.

Mil kvincent da miloj putrintaj en iuj tombejoj

Sen tabuloj kaj sen preĝoj ...

Ĉu vi ne ja vidas, kiel ili estis belaj, decidaj, feliĉaj

Vivi,

Kiel iliaj rigardoj ja brilis, kiel iliaj edzinoj ilin amis ?

Ili nun estas nenio pli ol putraĵoj ...

Por tiu fiega ĉifoneto !

Terura peco da teksaĵo ligita al via stango, mi malamas vin terure,

Jes, mi malamas vin kun la tuta animo, mi malamas vin pro ĉiuj la

mizeroj, kiujn vi kuntrenas,

Mi malamas vin je la nomo de la skeletoj ... Ili estis mil kvincent da
miloj,

Mi malamas vin pro ĉiuj, kiuj salutas vin,

Mi malamas vin pro la furzuloj, la fekuloj, la groŝoputinoj,

Kiuj trenas en la koto siajn ĉapelojn antaŭ via ombro,

Mi malamas per vi la tutan je jarcentoj aĝan subpremon, la bestia

dio,
Defio al la homoj, kiujn ni ne kapablas esti.
Mi malamas viajn malpurajn kolorojn, la ruĝo de ilia sango, la blua
sango, kiun vi ŝtelas de la ĉielo,
La blanko livida de viaj pentoj.
Lasu min, malnobla simbolo, plori sole, ploregi
La mil kvincent da miloj da junuloj, kiuj mortis.
Kaj ne forgesu, malgraŭ viaj generaloj, via orumita fero kaj venkoj,
Ke vi estas por mi el la fia raso de la pugtrutukoj.

La Monda Asembleo Socia (MAS) kaj ĝiaj libroj

La MAS estas asocio fondita en la jaro 2005 de Esperantistoj kiuj, inspiritaj de la artikoloj de la gazeto *Le Monde diplomatique en Esperanto* (<http://eo.mondediplo.com>) – reta, laŭokaze ankaŭ papera – volas ne nur legi, sed ankaŭ diskuti kaj agi.

Ĝi estas strikte bazdemokratia, travidebla (por siaj membroj), progresema organizaĵo, kiu funkcias nur pere de retroŝto kaj Interreto. Ĝi partoprenas laŭeble en la Mondaj kaj regionaj Sociaj Forumoj kaj referencas en sia statuto por sia agado tekstojn kunigitajn en la ĉi tie listigita libro “*Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj ...*” (n-ro 10 en la MAS-librolisto). Aliĝo kaj membreco estas senpagaj.

La ĝisnunaj spertoj montras, ke la MAS-anoj agadas precipe per verkado kaj tradukado de tekstoj al Esperanto.

Ĝia retejo: <http://mas-eo.org> enhavas ĉiujn interesajn informojn pri MAS, kaj krome multajn legindajn artikolojn, tradukitajn aŭ memverkitajn de la membroj.

Ĉiu membro rajtas ne nur publikigi en la repaĝo de MAS siajn tekstojn, sed ankaŭ publikigi librojn en la eldonejo de MAS, kondiĉe ke troviĝas la rimedojn por presado (ĉar aliĝo kaj membreco estas senpagaj, MAS disponas pri rimedoj pagi la eldonadon de libroj nur per enspezoj el vendo de jam aperintaj libroj). Tiel enspezita mono estas uzata ekskluzive por certigi eldonadon de novaj titoloj. La aktuala listo de la libroj aperintaj ĉe MAS estas konsultebla interalie en la repaĝo de MAS (<http://mas-eo.org>).

Tiu ĉi libro estas la titolo n-ro 231.

Enpaĝigita de MAS en paperformato de 14 · 21,6 cm kun
spegulitaj marĝenoj de 1,4 kaj 2,16 cm kaj litertiparoj Nimbus
Sans L de 10 punktoj (teksto kaj piednotoj), Lucida Conseole 18
punktoj (titoloj) per LibreOffice 5.1.6.2 sub Linukso Mint 18.

Presita en Anglujo en la jaro 2019